

88-a jaro • n-ro 1075 (11) • novembro 1995

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)



**Portretoj de estraranoj
EU pri plurlingveco
Inkunabloj serĉataj**

Estrara ekspedicio al Parizo

Enhavo

- 181 Estraro de UEA: La kapoj de UEA;
Kunforĝo de laborplanoj (István Ertl);
Influo fluos denove; *Simpatio* ne sufiĉas (Mark Fettes)
- 184 Junularo: Vi ne sukcesos neglekti TEJO-n (Danny ten Haaf);
Ekologia TEJO-seminario
- 185 Lingvopolitiko: EU-konsilio pri lingvodiverseco;
Konkludoj de la Konsilio pri lingva diverseco kaj plurlingveco
en la Eŭropa Unio (trad. Brian Moon)
- 186 Esperanto en radio: Radioelsendoj en Esperanto (OSIEK-AERA)
- 187 Kalendaro 1995-96
- 188 Intervjuo kun Ŝefik Rizvanović: Ĉefa agado: savi la vivojn
Movadaj eventoj: Kiaj perspektivoj por vidhandikapitoj?
(Nora Moerbeek); Bharato planas ĝis 2000; Kio estas
granda homo? (Ivor Hueting, Bruno Masala)
- 190 Kongresa komuniko 1 de la 81-a Universala Kongreso en Prago
- 191 Belartaj Konkursoj de UEA en 1996
- 192 Recenzoj: *Denaska dulingveco, Dulingve — pli simple* (Seán
Ó Riain); *Glozel kaj la prahistoria skribo, Kaj la suno haltis...*,
Le Plessis-Bourré kaj alhemio (Manuel de Seabra); *Vivi sur barko*
(Herbert Mayer); *Interrilatoj* (Rejna de Jong); *Ĉu vi aŭdis, ke...*
(Gbeglo Koffi)
- 194 Libroscienco: Trovi la lastajn inkunablojn (Reinhard Haupenthal)
Abontarifoj 1996 de la Libroservo de UEA
- 195 Laste aperis; Foliume
- 196 Reagoj
- 197 Loke — Fake
- 199 Oficiala informilo
- 200 Nekrologoj: Douglas B. Gregor; Anoncetoj

Vi trovos

daŭrigon de la “Unesko-fadeno” kiun ni komencis malbobeni en oktobro. Kun tiu numero en la mano, tri anoj de la nova Estraro ĵus vizitis Uneskon en Parizo (p. 183), post sia Roterdama kunsido (p. 182). Kiuj estas tiu Estraro? Ĵetu rigardon al la apuda paĝo por ekkoni aŭ rememori la vizaĝojn revidotajn dum almenaŭ tri jaroj. Ĉu tiu periodo sufiĉas por plenumi la planojn kiujn ili ambicias? Tio dependas grandparte de vi, de ni mem, ĉar realigi tiujn ne eblas sen la “mobilizo homa kaj financa” kiu konturiĝis kiel ĉefcelo en la estrar-kunsido.

Ĉar ni estas movado precipe pri lingvaj rajtoj, gravas koni tiajn dokumentojn kiel la konkludoj de EU-organo pri lingvodiverseco (p. 185). Tiaj gvidlinioj ja formas — iagrade — la estontan lingvan vizaĝon de Eŭropo. Kaj kiel oni lingvopolitikas en aliaj kontinentoj? Ni invitas la legantojn/verkantojn de nia revuo raporti pri tio.

La kovrilo: Metrohaltejo *Abbesses* en Parizo. Malgraŭ iuj lastatempaj bomb-atencoj, tri UEA-estraranoj ne hezitis metroi al la Pariza Unesko-sidejo.

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M. P. Berthelot
(1882-1910). **Establita** kiel organo
de UEA en 1908 de Hector Hodler
(1887-1920). **Legata** en 115 landoj.
Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld.
61; US\$ 33; GM 55; enoj 4320; ktp);
petu informojn ĉe via landa asocio
aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa
ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p.
1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p.
175. Movada rabato 50%. Ekstera-
kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato
por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj
de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA,
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +31-10-436-1044.

Telefaksa: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus
749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro
25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-
konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Osmo Buller.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj):
prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae
Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong,
Taegu 706-031, Korea Respubliko;
☎ +82-53-950-5425 [of], +82-53-765-
0880 [h]; ✉ +82-53-950-6247 [of], +82-
53-765-0881 [h]; ☐ keast@soback.
kornet.nm.kr.

Vicprezidanto (landa agado: Okci-
denta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edu-
kado): s-ino Renée Triolle, 4, impasse
des Charpentiers, FR-57100 Thionville,
Francio.

Ĝenerala Sekretario (strategia pla-
nado, eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark
Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa,
Ont., Kanado K1N 7P6; ☎ +1-613-565-
9282 [of/h]; ✉ +1-613-565-9279 [of/h];
☐ mfettes@magi.com.

Estrarano (financo, administrado):
d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9,
NL-7913 VV Hollandscheveld, Neder-
lando; ☎ +31-5284-1214 [h], +31-50-
613769 [of]; ✉ +31-50-613763 [of];
☐ azgiow6lfred@relay.nl.net.

Estrarano (landa agado: Orienta
Eŭropo, Azio, Oceanio; informado):
s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-
3000 Kaunas, Litovio; ☎ +370-7-
739776 [h], +370-7-208242 [of];
✉ +370-7-204970 [of].

Estrarano (kongresoj, kulturo, TEJO):
s-ino Michela Lipari, viale Giulio
Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio;
☎ +39-6-39-72-61-98 [h]; ✉ +39-6-39-
72-61-69 [h]; ☐ mc8750@mcmlink.it.

Estrarano (faka kaj scienca agado):
prof. Amri Wandel, 767 Makabim,
IL-71908 Israelo; ☎ +972-8-264462
[h], +972-2-658-6860 [of]; ✉ +972-2-
658-4437 [of]; ☐ amri@vms.huji.ac.il.

La kapoj de UEA

La ĵusa estrarkunsido donis okazon resumi kelkajn vivofaktojn de la novaj estraranoj. Pri prezidanto LEE vd. sep., p. 149.



Renée Triolle (1943), francino, instruisto.

“Frukto de la UK en Marsejlo” (1957), ŝia naskiĝurbo. Pro bona lernado ricevas stipendion por la Brusela UK

(1960). “Miss Esperanto” en Tokio (1965). Funkcioj ĉe la franca kaj tutmonda E-junularo (TEJO-sekretario 1973-75), ĝen. sekretario (1977-85) kaj prezidanto (1985-94) de la franca landa asocio UFE, UEA-komitatano (1974-). (“Mi trairis ĉiujn ŝtupojn de la movado, sed mi daŭre agas ankaŭ loke.”) Kvankam diplomita pri la rusa lingvo, dum 7 jaroj laboras kiel lerneja administranto, ĉar “pri la utilo de la rusa oni same malfacile konvinkas gepatrojn kiel pri E-o”. Nun preskaŭ ĉiusemajne pendolas inter la norda Thionville (laboro), suda Marsejlo (hejmo) kaj Parizo (movado).



Mark Fettes (1961), novzelandano, ĵurnalisto.

Lernas E-on el libro donacita de lia onklo Christopher. Studas biokemion (1980-86)

en Kemбриĝo (Britio) kaj Vankuvero (Kanado), sed rezignas pri la ideo de tiufaka profesio. Datas sian esperantistecon je 1980, sed ricevas la “finan puŝon” de la Vankuvera UK (1984), en kies kongresejo li laboras. Lia vojo kondukas al Roterdamo (1986), kie li redaktas ĉi tiun revuon (1987-91). Gajnas Maxwell-premion per sia eseo *Al unu lingvo por Eŭropo?* (1990). Lanĉas la Esperantan Unesko-asociacion Monda Kunagado (1991). Editoras la rememorojn de Hans Jakob (*Servisto de l'ideo*, 1995). Estrarano ekde 1992, ĝenerala sekretario de 1994. Edzo, patro de Adrian (1994).



Amri Wandel (1954), israelano, astrofizikisto ĉe la Universitato de Jerusalemo.

Unua lingvo: la germana; liaj ĉeflingvoj tamen fariĝas la hebrea,

poste ankaŭ la angla. Eklernas E-on koresponde (1973), vizitas en 1974 la Hamburgan UK-on (“mi ricevis la impreson ke la E-movado estas krizema”). Pli forte impresiĝas de TEJO, iĝas estrarano (1977-83), vicprezidanto (1979-81) kaj prezidanto (1981-83). Prezidas E-Ligon en Israelo (1990-). Komitatano (1983-), akademiano (1992-), komisiito pri scienca aplikado (1992-). Doktoro pri astrofiziko (1983), specialiĝas pri kvazaroj kaj nigraj truoj. Docentas plurajn jarojn en Usono (Univ. Princeton, Maryland, Stanford). Multe publikigas angle, foje ankaŭ en E-o. Ne hazarde, interesiĝas pri terminologio kaj lingvopolitiko. Edzino: Gila, renkontita en E-kurso. Filinoj: Tali (10-jara), Maja (7 j.), filo: Raneto (1 j.). Hejmlingvoj: Esperanto, hebrea.



Michela Lipari (1948), italino, ŝtatoficisto.

E-iĝas en mezlernejo (1965) kaj “vegetas surloke” en Novara ĝis la unua eŭroponivela renkontiĝo

(1968). Baldaŭ jam la plej longdaŭra redaktoro de la junulara bulteno *Koncize* (1971-77). Estraranas ĉe la italaj gejunuloj (1969-75) kaj plenkreskuloj (1971-91), kaj ĉe UEA (1992-). Regula kongresano: vizitas IJK-ojn (1970-73) kaj ĉiujn UK-ojn (1975-). Laboras ĉe la Ŝtata Trezorejo. Pro nova posteno translokiĝas al Romo (1980). Ne emas prelegi kaj instrui (kvankam foje faras), sed ja agi. Favoras maleŭropigon de UEA, ŝatus esplori kial ne venas pli da homoj al la UK-oj. Hobioj: atletiko (organizas konkursojn) kaj trikado. Faris tradukojn el Gianni Rodari, ĝis nun por la tirkesto. Edzino (1978-) de la japano Yasuo Sato (“kompreneble, esperantisto”).



Povilas Jegorovas (1955), litovo, advokato en Kaunas.

(“Mi estas mastro de mia tempo kaj relative bone enspezas.”) Lernas Esperanton

(1970) pro scivolo vekita de instruisto. Aktivas de 1972, baldaŭ vicprezidas la legendan sovetian junularan movadon SEJM, poste la litovan filion de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (“ni deziris litovan asocion, sed tiam ne eblis”). Diplomiĝas (1978) per tezo pri la internaci-jura statuso de UEA. Vicprezidas (1988) kaj prezidas (1993) la restarigitan (1988) Litovan Esperanto-Asocion. (“Ĝi estis la unua asocio kiu refondiĝis en Litovio, eĉ antaŭ la olimpika komitato.”) Motoras la realigon de Esperanto-Centro en la iama domo de la bopatro de Zamenhof (1993). Ĉefdelegito (1993). Edzo (1979), patro (15-jara filino Neringa).



Fred de Geus (1952), nederlandano, komputilisto.

“Duoble denaska” esperantisto, ĉar ambaŭ gepatroj parolas al li nur Esperante. Mal-

graŭ tio enmovadiĝas, “pro la junulara klubo en Groningen”, kie li renkontas sian postan edzinon. Kuntradukas la E-lingvan *Asteriks, la gaŭlo* (1979), posedas 2500-voluman kolekton de bildstrioj. Filatelisto, ekde 1977 prizorgas vendadon de poŝtmarkoj favore al UEA. Helpas aŭtomatigi la CO-n de UEA (1980). Membras en la Financa Komisiono (1984-85). Studinte matematikon kaj informadikon, doktoriĝas tamen pri medicin-rilata temo, “decidsubteno en anestezio”. Laboras kiel datum-mastrumisto en la operacia centro de malsanulejo en Groningen. Edzo, patro de Liesbeth (1987). Taksas sin pli praktikema ol idealisma — sed nepre lojala. ★

Kunforĝo de laborplanoj

Du monatojn post sia elektiĝo, la Estraro de UEA jam kunvenis en Roterdamo (30 sept. – 1 okt.), por kiel eble plej rapide difini sian laborplanon.

Se neinformita vizitanto enrigardus Salonon Zamenhofen la mateno de la lasta septembra tago, tiu povus kredi ke li trafis seminarion pri movada historio. Ĝenerala sekretario Mark Fettes ja parolis tiam pri Hodler, pri la kontrakto de Helsinko kaj aliaj historioj. Sed tiu ŝajno trompus: ĝuste por funde kompreni la aktualon, la nova Estraro unue aŭdis superrigardojn pri la historio de UEA (Fettes), la funkciado de la Centra Oficejo (CO-direktoro Osmo Buller), la financo de UEA (eks-estranaro Hans Bakker) kaj ties fondaĵoj (ĝenerala direktoro Simo Milojeviĉ).

Fettes klarigis ke pluraj kritikeblaĵoj ĉe UEA sekvas el tio ke ĝi estas ne rigore planita konstruaĵo, sed “organika kreskaĵo”, evoluinta parte hazarde: ekzemple, se oni alirus teorie la demandojn kia devus esti la ĉefa movada organizaĵo, estas certe ke instruado (nun prizorgata unuavice de ILEI) okupus centran lokon. La bazaj servoj de UEA estas dekomence la samaj (revuo, jarlibro, delegita reto), ĉar la membroj tiujn postulas. Tiun konserveman deziron de kontinuelo komplementas tamen ilia sopiro al modernigo kaj movada progreso — jen kial la asocio devas delikate ekvilibri inter konservemo kaj ŝanĝemo.

Buller eksplikis ke la servoj de UEA konsistigas ĉiam pli grandan parton de la *infrastrukturo* esperantista: ekz., en la lasta jardeko la enskriboj ĉe la librotena fako kreskis per triono, kaj signife multiĝis la laboro de la Libroservo. Dum la servoj tiel ŝvelis, la oficistaro malkreskis (11,9 postenoj en 1983, 10,4 en 1994).

Stafetante siajn spertojn al la samlanda posteulo Fred de Geus, Hans Bakker konsilis bazi la financon politikon sur pesimisma bildo pri la estonteco, ĉar eĉ se la financa situacio de UEA signife pliboniĝis dum la lastaj jaroj, la proporcio de nepagipovaj, helpobezonaj esperantistoj plu emas kreski.

Oni konsentis ke la agadon de la fondaĵoj pritraktu serio da artikoloj en la revuo, eble ankaŭ broŝuro.

Influo fluos denove

La bulteno de UEA pri informado kaj eksteraj rilatoj ne aperis dum la lastaj du jaroj pro manko de homfortoj. Nun kreiĝas redakta teamo ekster la Centra Oficejo sub la gvido de Geoffrey Greatrex, antaŭa prezidanto de Brita E-Asocio kaj Eŭropa E-Unio. Materialojn por *Influo* bonvolu daŭre sendi al la Centra Oficejo en Roterdamo, kun la indiko “Informa Fako”. Eblas ankaŭ sendi *kopion* al la redaktoro: Geoffrey Greatrex, 469A Wilbrod Ave., Ottawa ON, Kanado K1N 6N1; tel. +1/613/562-93-26; retpoŝto greatrex@aix1.uottawa.ca.



Mobilizo homa kaj financa

La esenca celo de ĉi tiu kunsido estis diskuti pri la unuopaj laborplanoj de la estraranoj, kaj sekve dividi la taskojn. Rapide klariĝis ke prezidanto Lee vidas sian rolon kiel kunordigan kaj reprezentan. Por reguligi la (i.a. retroŝtan) inform-fluon en la Estraro, abundan jam en la unuaj du monatoj de ties mandato, Lee kolektos kaj dissendos la agad-resumojn de la estraranoj en ĉiu dua monato.

Por Fettes, pro liaj spertoj dum la antaŭa mandato, la ĉefa celo estas mobilizo homa kaj financa, t.e. krei retojn da homoj laŭplane laborantaj, intense komunikantaj, kiuj mem sukcesas trovi novajn homojn kaj monfontojn por sia agado. Li opinias la validan Strategian Planon de UEA bona agad-bazo, sed necesos igi ĝin pli inspira per revizio kaj simpligo. En la kampo de eksteraj rilatoj li opinias ebla ligi Esperanton al la aktualaj, tutmonde diskutataj temoj, sen perdi la neŭtralecon. Tiucele li ekdiskutis la Estraron pri la enhavo de lanĉota manifesto.

Lee kaj Fettes planas Simpozion pri Lingvo en Internaciaj Organizaĵoj, kiu okazu dum la unuaj tagoj de la Praga UK. Pri ekstermovadaj subteno kaj partopreno ili nun esploras ĉe diversaj instancoj kaj fondaĵoj. La ne-esperantistaj simpozianoj povos observi la funkciadon de E-o en internacia medio kaj debati pri ĝia lingvopolitika graveco. Tiu “Nitobe-simpozio” markus la 75-an datrevenon de la tre favora raporto kiun Inazo Nitobe, vicsekretario ĝenerala de la Ligo de Nacioj, verkis pri E-o en 1921, partopreninte la 13-an UK-on ĝuste en Prago.

Renée Triolle kaj Povilas Jegorovas dividas inter si ĉiujn mondregionojn, plus la kampojn de informado kaj instruado. Triolle ŝatus ke UEA kompilu kaj disponigu informojn kvazaŭ datumbanko. En Okcidenta Eŭropo ŝi vidas neceson de plua kunordigo. En Afriko kaj Ameriko ŝi volas stimuli partnerecojn je klubaj kaj landa niveloj, kuraĝigi regionajn renkontiĝojn, instigi preleg-vojaĝantojn. Jegorovas celas ke la atendoj kaj bezonoj de la landaj asocioj estu pli bone konataj ĉe UEA. Li planas vigligi la translimajn movadajn forumojn en “siaj” regionoj.



Foto: Franĉjo Veuthey

Amri Wandel spronos la reciprokajn rilatojn de UEA kun la Akademio de Esperanto kaj kun Akademio Internacia de la Sciencoj (li ja estas membro de ambaŭ). Li

Simpatio ne sufiĉas

Pro ŝparaj konsideroj, kaj unuavice pro instigo de la nova prezidanto de UEA, kelkaj estraranoj profitis sian flugon al Roterdamo por ekspedicii al Parizo kaj Bruselo.

La eksperimento sukcesis: pli ol dek rendevuoj ĉe Unesko kaj du ĉe institucioj de Eŭropa Unio starigis novajn kontaktojn kaj montris allogajn ŝancojn por kunlaboro.

La 3-an de oktobro, Uneskon vizitis LEE Chong-Yeong, Mark Fettes kaj Amri Wandel, kune kun la surlokalaj reprezentantoj Barbara Despiney (UEA) kaj François Lo Jacomo (ILEI). La vizito havis plurajn celojn: sondi pri la partopreno de Unesko en lingvopolitika simpozio organizota venontjare; trovi subtenon por internacia esplorprojekto pri Esperanto-familioj; esplori pri novaj formoj de kunlaboro kadre de la nova sesjara Strategia Plano de Unesko; kaj veki intereson pri Esperanto ĉe aliaj neregistaraj organizoj. (Pri tiu lasta temo skribos Wandel en sekva numero.)

Ĉe la Eduka Sektoro de Unesko, ni renkontis unue s-ron Andri Isaksson, estron de la Sekcio por la Renovigo de Lernejoj Programoj kaj Strukturoj. Li promesis rapidan kaj favoran traktadon de la proponoj de UEA post la venonta Ĝenerala Konferenco, t.e. post novembro.

Tre amike akceptis nin ankaŭ s-ro Richard Halperin, estro de la Sekcio por Duagrada Edukado. Li aparte invitis la tujan kontribuon de UEA al aktuala projekto por la publikigo de "modelaj instruprogramoj" el diversaj landoj, dirante ke li volonte vidos tie eron pri Esperanto.

Kun s-ro Joseph Poth, specialisto pri lingvo-instruado, ni diskutis precipe pri la "Linguapax"-konferencoj, kiuj studas la kontribuon de lingvolernado al la scio, kompreno

pledas por pli da UEA-servoj al fakaj asocioj, kaj celas kontaktigi ĉi tiujn kun neregistaraj organizoj similfakaj.

Michela Lipari volus igi la Universalajn Kongresojn pli allogaj, precipe por unuafojaj partoprenantoj, kiuj nun eble sentas sin iom perditaj. Samtempe ŝi ne hezitus kuraĝigi aranĝon de regionaj kongresoj en mondpartoj foraj al la samjara UK. Ŝia kultura prioritato estas montri la E-kulturon al "ekster-Esperantujo".

Fred de Geus heredos la rigoron de Bakker koncerne la elspezojn, sed li volus esti pli malferma al investoj kiuj kreskigos la enspezojn. Li daŭrigos la strebojn al trarvidebleco de la financo, per klara prezento kaj analizo.

El la plej diverstemaj diskutoj de la Estraro ni menciui tiun pri la eblaj kongreslokoj en la jaroj 1998-2001 (i.a. Montpeliero, Berlino kaj ie en Brazilo), sed montriĝis frue por kiu ajn decido. Por faciligi en Prago la UK-partoprenon al la landanoj mem, la aliĝ-kotizo por ŝtatanoj de la Ĉeĥa Respubliko kaj Slovakio estis forte rabatita.

La Estraro akceptis la peton de Simo Milojević, esprimantan jam en marto ĉi-jare, retiriĝi el sia nuna posteno post 22-jara laboro kiel vicdirektoro aŭ ĝenerala direktoro. Post la 1-a de januaro 1996 li ja restos kelkajn pliajn jarojn en la CO, sed aktivos en aliaj laborkampoj. Tiu ŝanĝo sekvigas redifinon de taskoj ĉe aliaj oficistoj: plej grave, la postenon de ĝenerala direktoro okupos Osmo Buller, la nuna direktoro de la oficejo.

István Ertl

kaj toleremo pri aliaj popoloj. Poth bonvenigis la proponon de UEA ke ĝi mem esploru la eblecon organizi unu konferencon en tiu serio.

Plia tre utila kunsido okazis ĉe s-ino Ndèye Fall, kiu kunordigas la rilatojn inter Unesko kaj ĉiuj neregistaraj organizoj. Venontjare oni forte kribros tiujn rilatojn, por restigi nur organizaĵojn vere tutmondajn kaj aktivajn sur la agadkampoj de Unesko. Kvankam UEA certe senprobleme trapasos tiun ekzamenon, por tio necesos pretigi aŭ traduki plurajn dokumentojn.

El Parizo, Fettes kaj Lee rapidis reen al Bruselo por matena kunsido, la 4-an de oktobro, kun anoj de la laborgrupo por kontaktoj kun EU. Tie aliĝis ankaŭ Michela Lipari. La grupo priparolis kunlabor-eblojn kun la estrino de la brusela oficejo de Eŭropa Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj, unu el la ĉefaj pledantoj por lingvaj rajtoj en la kadro de EU. Vespere la delegacion akceptis komisionanino Emma Bonino, kiu estras la agadojn de EU pri fiŝkaptado kaj la protektado de konsumantoj. Konvinkita amiko de Esperanto, Bonino malferme parolis pri la manko de subteno por la lingvo inter ŝiaj kolegoj en la Komisiono, kaj konsilis enplekti parlamentanojn kaj aliajn influajn homojn por klopodi ŝanĝi tiun sintenon.

La vizitoj konfirmis ke intereso kaj simpatio pri E-o ne mankas en internaciaj instancoj. Ofte ŝajnas ke oni preskaŭ senpacience atendas nin, kvazaŭ ekkriante: "Ha, kie vi restis tiom longe?" Sed tia simpatio, kaj tiaj personaj kontaktoj, en si mem ne sufiĉas: necesas longa kaj ofte intensa laboro por transformi ilin en konkretajn agojn. Por tio ni bezonas mobilizi nin mem, niajn membrojn, asociojn. Tio restos inter la ĉefaj prioritatoj de la Estraro.

Mark Fettes

Ĝenerala Sekretario

Vi ne sukcesos neglekti TEJO-n

En la 7-a kaj 8-a de oktobro kunsidis en Roterdamo la nova Estraro de TEJO, freŝe elektita en la lasta IJK.


En septembro (p. 150) vi jam povis legi la nomojn de la novaj estraranoj. Ses el ili ne anis antaŭe, sed ĉiuj estas jam sufiĉe spertaj en la nacia aŭ internacia movado. Kvankam sep el la ok anoj loĝas en Okcidenta Eŭropo, ne pensu ke la agado de tiu ĉi Estraro tro koncentriĝas al tiu mondparto — kolektiĝis ja tuta aro da proksimaj kunlaborantoj en Orienta Eŭropo, Azio kaj Usono. Precipe pri eksteraj rilatoj daŭre plinombriĝas la kunlaborantaj aktivuloj, kaj ili tre faciligas la taskojn de la Estraro!

Finfine aperis Pasporta Servo!

Pri kio diskutis tiu freŝbakita Estraro en plej amika etoso? Kelkaj gravaj decidoj:

- La IJK en 1997 okazos en Asizo (Assisi, Italio), verŝajne en la dua duono de julio.
- Finfine, aperis la longe sopirata eldono 1995 de Pasporta Servo, pli ol unu jaron malfrua. La Estraro konscias ke ne plu akcepteblas tiaj eldonfuŝoj, kaj ĝi akceptis la oferton de kvarpersona teamo (inter kiuj du estraranoj!) kiu garantias laŭplanan kompiladon kaj kompostigon. La venonta eldono devos aperi en junio 1996, valida por la dua duono de

1996 kaj tuta 1997. Poste ĝi aperu regule ĉiujare en decembro ekde la jaro 1997. Ni aparte informos la gastigantojn.



**Longe sopirata:
Pasporta Servo 1995***

- TEJO daŭrigos sian subtenon al Eŭropa Junulara Esperanto-Oficejo en Bonn (BonEJO, vd. majo p. 88), kiu okupiĝos ĉefe pri la eŭropaj rilatoj de TEJO, sed ankaŭ disponeblas por fari servojn al aliaj eŭropaj E-organizoj. Ĉar ĝia financa

situacio ne estas plene certa, daŭre bonvenas donacoj al la UEA-konto de BonEJO, "ejeo-u".

TEJO fartas bone

La fakto ke en la komenco de tiu ĉi jaro ni aliĝis al la Junulara Forumo (JF) de Eŭropa Unio (feb., p. 31), gvidos nin al multaj novaj kontaktoj kun aliaj organizoj, kontaktoj gravaj ankaŭ el financa vidpunkto. Ĉe la de longe uzataj subvenci-fontoj ni ŝajne jam atingis la limojn de la ebloj. Pro nia aliĝo al JF novaj ebloj aperas, pri kiuj indas tre bone esplori. Novaj agadoj postulas pli kaj pli da rimedoj, kaj ju pli da mono ni povos atingi, des pli ni povos efike uzi la laborfortojn de niaj aktivuloj. Pro tio estas tre ĝojige konstati ankaŭ ke multaj homoj aprezas nian laboron kaj subtenas ĝin — la daŭre kreskanta aro de Patronoj de TEJO kontribuas al la financaj rimedoj de TEJO per grava parto. Sed ĉiam bonvenas pliaj Patronoj!

Landa agado, aktiva trejnado

En Eŭropo fondiĝis dum kelkaj jaroj pluraj "ĉeloj" de aktive kunlaborantaj landaj sekcioj. En Azio revigliĝas la junulara movado, kion indikas la okazigo de IJK lastjare en Koreio, kaj la tiea akcepto de novaj landaj sekcioj en Japanio kaj Irano. Usona Esperantista Junularo ŝatus organizi IJK-n en Usono. Havante estraranon en Brazilo, ni esperas starigi kontaktojn pli regulajn en Sud-Ameriko.

Sukcesa trejnseminario por junaj aktivuloj okazis aŭguste en Kroatio, kaj oni planas similan venontjare en Pollando. La Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO ĉiujare organizas seminariojn. Estas nun planataj tiaj por printempo 1996 en Irlando (vd. ĉi-apude) kaj por aŭtuno 1996 en Pollando, kunlabore kun Skolta E-Ligo.

TEJO konstante paŝas antaŭen. Kiel nova prezidanto mi povas nur atesti ke mi ĝojegas labori en tiom agadopreta teamo. TEJO plenas je energio! Vi ne sukcesos neglekti nin ...

Danny ten Haaf
Prezidanto de TEJO

*Prezo ĉe UEA: 24 gld. + sendokostoj (10%, min. 5 gld.) + imposto de 6% por EU-landoj. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.


Ekologia TEJO-seminario

Eŭropo alfrontas ekologian krizon kaj multflankajn ekologiajn problemojn, kiel ekz. rubon, toksan poluon, transporton kaj energi-trouzadon. Kie fontas tiuj problemoj? Kie troveblas solvoj por ili?

Pri tio oni diskutos en la TEJO/KER-seminario "Paŝi malpeze sur la tero — junularo kaj ekologio", inter la 16-a kaj 23-a de marto 1996 en Conamara, Irlando. Atendataj estas junaj Esperanto-aktivuloj (sub 30 jaroj) el la landoj de Konsilio de Eŭropo.

Pri aliĝo kaj program-kontribuo turnu vin al:

Daithí O' hÉalaithe
54 Páirc Éabhóra
Beann Éadair Co. Bh.Á.C.
☎ +353/1/832-40-87
✉ dhealy@vax1.tcd.ie



TEJO/KER-seminario,
16-23 marto, Irlando

EU-konsilio pri lingvodiverseco

La 12-an de junio la Konsilio de Ministroj de Eŭropa Unio alprenis konkludojn “pri lingva diverseco kaj plurlingveco en EU”, kiujn la ŝtatestra EU-renkontiĝo en Cannes (26 jun.) konfirmis. Jen dokumento konenda por esperantistoj agantaj pri eŭropa lingvopolitiko, kaj utila ankaŭ por tiuj vivantaj en mondpartoj kie plurlingveco apenaŭ estas temo por politikistoj.

La Konsilio de Ministroj estas la ĉefa, tre ofte kunsidanta decidorgano de EU, kiu i.a. konkretigas la gvidliniojn fiksatajn de la Eŭropa Konsilio de EU-ŝtatestroj kaj-registarestroj.

Ni povas nur konsenti kun ĝiaj konkludoj kiam temas pri la valoro kaj konservindeco de la plurlingva stato en Eŭropo. Sed duboj povas

trafi la indikitajn rimedojn de konservado: ĉu edukprogramoj (7) kaj nove kreataj laborpostenoj (2) sufiĉas por gardi la diversecon, kiam similaj streboj ĝisnunaj nur helpis fortigi la pozicion de “grandaj” lingvoj? Kaj eĉ se la oficialaj lingvoj (13) ĝuos efektive egalan statuson, ĉu tio sufiĉas por ke ĉiuj EU-civitanoj, ankaŭ tiuj


parolantaj aliajn lingvojn, “havu egalan aliron al informoj” (6)? La demandoj multas. Al ili ne ekzistas unusola kaj ĉiosolva respondo, ankaŭ ne ĉe esperantistoj — sed nia lingvo estas mem propono, kiun oni devus preni en konsideron. (Cetere, la laborgrupo kies starigon petas [12], ĝis nun ne estas establita.) ★

Konkludoj de la Konsilio pri lingva diverseco kaj plurlingveco en la Eŭropa Unio

1. La Konsilio konfirmas la gravecon por la Unio de ĝia lingva diverseco, kiu estas esenca elemento de la eŭropaj dimensio kaj identeco kaj de la komuna kultura heredaĵo.
2. Ĝi substrekas la demokratiajn, kulturajn, sociajn kaj ankaŭ ekonomiajn implicojn de tiu diverseco. La lingva diverseco ankaŭ kreas laborpostenojn kaj aktivadojn kaj estas integriga faktoro. Ĝi estas avantaĝo por la ekstera disradiado de la Unio, ĉar plej multaj el la lingvoj de la Eŭropa Unio estas uzataj en granda nombro da eksteruniaj landoj.
3. La Konsilio konsideras ke la evoluo de la inform-socio prezentas novajn ŝancojn kaj novajn defiojn por plurlingveco kaj lingva diverseco.
4. Lingva diverseco estas komponento de la nacia kaj regiona diverseco de la Membro-Ŝtatoj kiun mencias Artikolo 128 de la Traktato. La Komunumo devas preni ĝin en konsideron en sia agado laŭ aliaj dispozicioj de la Traktato, inkluzive Artikolojn 126 kaj 127, kiuj rilatas al edukado, profesia klerigado kaj junularo.
5. La Konsilio emfazas ke necesas konservi la lingvan diversecon kaj antaŭenigi plurlingvecon en la Unio, kun egala respekto al la lingvoj de la Unio kaj konforme al la principo de subsidiareco.
6. Por ke la civitanoj subtenu la konstruadon de Eŭropo necesas garantio ke la lingvoj de la Unio estos prenataj en konsideron kaj ke ĉiuj havos egalan aliron al informoj, konforme al la nacia juro de la Membro-Ŝtatoj kaj kun respekto al la Komunuma juro.
7. Tiurilate la Konsilio bonvenigas precipe la rezolucion de la Konsilio de la 31-a de marto 1995 pri la kvalita plibonigo kaj la diversigo de la lernado kaj instruado de lingvoj en la edukistemoj de la Eŭropa Unio kaj la alprenado de la programoj Socrates, Leonardo kaj Junularo por Eŭropo.
8. Ĝi ankaŭ notas la intencon de la Komisiono prezenti, laŭ peto de la Eŭropa Konsilio en Kerkiro, komunikon pri la lingvaj aspektoj de la informsocio, senprokraste ekzamenotan de ĝi.
9. La konsilio emfazas la gravecon kiun ĝi donas al tio, ke la lingva dimensio estu prenata en konsideron en la eksteraj rilatoj de la Unio, precipe en la kadro de programoj de la Unio kiuj tuŝas ne-uniajn landojn.
10. La Konsilio petas la Komisionon preni en konsideron la lingvan diversecon kaj plurlingvecon en la ellaborado kaj realigado de Komunumaj politikoj kaj agadoj.
11. La Konsilio petas la Komisionon inventari kaj pritaksi la politikojn kaj agadojn de la Komunumo kiuj prenas en konsideron lingvan diversecon kaj plurlingvecon kaj raportu al la Konsilio en tempolimo de unu jaro.
12. La Konsilio petas la Komisionon starigi grupon de reprezentantoj nomitaj de la Membro-Ŝtatoj kun la tasko, sen damaĝo al la agado de ekzistantaj komitatoj kaj en kunlaboro kun ili, priatenti la konsideradon de la lingva diverseco kaj la antaŭenigon de plurlingveco en la politikoj kaj agadoj de la Unio, kun respekto al la naciaj politikoj de la Membro-Ŝtatoj.
13. La Konsilio aldone reatentigas pri la graveco kiun ĝi donas al la egaleco de la oficialaj lingvoj kaj la laborlingvoj en la institucioj de la Unio, nome la germana, la franca, la itala, la nederlanda, la angla, la dana, la greka, la hispana, la portugala, la finna kaj la sveda, konforme al Reglamente 1/58 tia kia ĝi estas modifita, fiksanta la lingvan sistemon aplikendan en la institucioj de la Unio. La Konsilio reatentigas pri la aparta statuso de la irlandaj lingvoj laŭ Artikolo S de la Traktato pri la Eŭropa Unio kaj laŭ la Traktato pri la aliĝo de Danio, Irlando kaj la Unuiĝinta Reĝlando.

Tradukis Brian Moon

Esperanto en radio



Radioelsendoj en Esperanto (horoj laŭ UTC)

Ĉiutage			
Japanio, Koreio	11-11:30	Ĉina R. Internacia	6955 9480
Sudorienta Azio	13-13:30	Ĉina R. Internacia	11600 (?) 11650 (?)
Eŭropo	14:30-15*	Pola R. Varsovio	7145 7285 9525 6000 SAT ¹
Eŭropo	20-20:30	Ĉina R. Internacia	7405 7470 9965 15370
Eŭropo	21:30-22*	Pola R. Varsovio	6035 6095 SAT ¹
Latin-Ameriko	22:30-23	Ĉina R. Internacia	9480 11500 6950
Amerikoj (?)	3:30-4	R. Bandeirantes	11925
Nur dimanĉe			
Pacifika Azio	7-7:30	R. Havano Kubo	6195
Orienta Azio	12:30-12:55	R. Aŭstria Internacia	15450
Suda, Sudorienta Azio	15:30-15:55	R. Aŭstria Internacia	11780
Eŭropo	4:30-4:55	R. Aŭstria Internacia	6155 13730
Eŭropo	11:30-12*	Pola R. Varsovio	SAT ¹
Okeidenta Azio	12:30-12:55	R. Aŭstria Internacia	9665
Eŭropo	12:30-12:55	R. Aŭstria Internacia	6155 13730 ² 15450
Eŭropo	15:30-15:55	R. Aŭstria Internacia	6155 9665 11780 13730 ²
Eŭropo, Mediteraneo	19:30-20	R. Havano Kubo	11705
Eŭropo	20:20-20:30*	R. Vatikana	[mez. 527 1530] 5882 4005 SAT ³
Eŭropo, Mediteraneo	22-22:30	R. Havano Kubo	11705
Norda Ameriko	7-7:30	R. Havano Kubo	6195
Norda Ameriko	12:30-12:55	R. Aŭstria Internacia	13730
Amerikoj, Karibio	15-15:30	R. Havano Kubo	9550
Amerikoj, Karibio	23:30-0	R. Havano Kubo	11760 9550 6195
Dum aliaj tagoj			
mer 20:20-20:35*	Eŭropo	R. Vatikana	[mez. 1611] 4015 6185
mer 23:15-23:25*	Eŭropo	R. Sarajevo	[mez. 612] 7105 ⁴
ĵaŭ 21:15-21:30*	Eŭropo	Estona R.	[mez. 1035] 5925
sab 6:30-7*	Eŭropo	R. Vilnius	9710 ⁵
sab 20-20:20	Eŭropo	RAI Internacia Roma	6030 7255

*ekde 31 marto 1996 unu horon pli frue (ĉar konstanta laŭ Eŭropa Tempo)

¹ Pola Radio Varsovio estas ricevebla ankaŭ persatelite, de Islando ĝis Israelo, de Moskvo ĝis Maroko, per la satelito Hot Bird 1: Eutelsat II f6 13° E, TVPolonia 11,476 GHz Hpol, 7,56 MHz.

² Radio Aŭstria Internacia baldaŭ elsendos persatelite, tra unu el la Astra-satelitoj, laŭ diĝita procedo.

³ Tiu dimanĉa programo de Radio Vatikana okazas ankaŭ dum kristanaj festotagoj, laŭ la sama horo. Ĝi estas ricevebla ankaŭ persatelite, en Eŭropo, de la satelito Eutelsat II f1 13° E, MBC 11,554 GHz Hpol, 7,74MHz.

⁴ Radio Sarajevo dumnokte inter merkredo kaj ĵaŭdo.

⁵ Radio Vilnius elsendas nur la lastan sabaton en monato.

fonto: OSIEK-AERA, Amikaro de Esperanto en Radio

Adresoj

Pola Radio – Esperanto
Skrytka 46, PL-00 977
WARSZAWA, Pollando
☎ [48] (2) 645-5917 aŭ -5919

Ĉina Radio Internacia – Esperanto
CN-100866 BEIJING, Ĉinio
☎ [86] (10) 851-1428 aŭ -3175

Radio Bandeirantes – Esperanto
C.P. 372, BR-01059-970
SÃO PAULO, Brazilo

Radio Aŭstria Internacia – Esperanto
AT-1136 WIEN, Aŭstrio
☎ [43] (1) 87878-3630 aŭ -4404
✉ info@rai.ping.at

Radio Havano Kubo – Esperanto
P.F. 6240, LA HABANA, Kubo
☎ [53] (7) 338729
telekso: 51 1344 rhc cu

Radio Vatikana – Esperanto
VA-00120 CITTÀ DEL VATICANO
☎ [39] (6) 63 28 39
✉ c.sarandrea@agora.stm.it

RAI Internacia – Esperanto
C.P. 320 Centro Corr., IT-00187
ROMA, Italio
☎ [39] (6) 331 71 895

Estona Radio – Esperanto
Gonsiori tn 21, EE-0100 TALLINN,
Estonio
☎ [372] (2) 434 139

Radio Sarajevo – Esperanto
p/a “Oslobodjenje”, Dunajska 5,
SI-61000 LJUBLJANA, Slovenio
☎ [387] (71) 455 141, 445 855

Radiocentras – Esperanto
A.D. 1792, LT-2019 VILNIUS,
Litovio

Radio 3.ZZZ – Esperanto
P.O. Box 1106, Collingwood,
Victoria 3066, Aŭstralio
☎ [61] (3) 9415 1818

Magyar Rádió – Esperanto
HU-1800 BUDAPEST, Hungario

Radio Radicale 1 – Esperanto
Via Principe Amedeo 2, I-00185
ROMA, Italio

Radio Rio de Janeiro – Esperanto
Av. Passos 30, BR-20051-000
RIO DE JANEIRO, Brazilo

Se vi kaptas stacion,
informu ĝin.
Se vi ne kaptas stacion,
informu ĝin.

Kalendaro 1995-96

Ĉi-sube sekvas daŭrigo kaj kompletigo de la aranĝo-listo aperinta en nia juli-aŭgusta numero (p. 130-131). Informoj pri eventoj tie anoncitaj estas nur parte ripetataj.

decembro

- 01-03: 46-a Kultura Semajnfino de Sarlanda E-Ligo, Homburg, Germanio (Sarlanda E-Ligo, Pf. 2019, DE-66470 Zweibrücken; diversnivela lingvokursoj; prelegoj de Rokuro Makabe kaj Harald Schicke pri "Vivo kaj verko de prof. S. Kato")
- 07-10: 5-a DisSeminario junulara, Possagno, Italio (Flavia Dal Zilio, via Cappelotto 11, IT-31100 Treviso; ☎+39/422/23-760; temo: "Internacia volontulado")
- 12-15: 8-a Sudbrazila Renkontiĝo, Campos do Jordão (Symilde Schenk Ledon, C.P. 269, BR-12460-000 Campos do Jordão - SP; temo: "Aspektoj historiaj de Esperanto")
- 14-17: Paranaa Renkontiĝo de E-o, Foz do Iguaçu, Brazilo (Paraná E-Asocio, C.P. 1701, BR-80001-970 Curitiba - PR; temo: "Paranao ene de la amerika agado")
- 27-03: 39-a Internacia Seminario de Germana E-Junularo, Wetzlar (Holger Boos, Kräuterweg 25, DE-51069 Köln; ☎+49/221/685-597; temo: "Perforto")
- 27-03: 12-a Internacia Festivalo, Rotenburg an der Wümme, Germanio (Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Nienstein; ☎+49/5624/8007; ☎5624/322; por mezaĝuloj kaj junaj familioj; temo: "Naturkuracado")
- 28-31: Tria Togolanda E-Kongreso, Kpalime (Unuigo Togolanda por E-o, B.P. 12096, Lomé)
- 28-02: Kvara Afrika Kongreso de E-o, ĉe Kilimanĝaro, Tanzanio (CO de UEA; temo: "Imagoj pri Afriko: Kontinento de espero aŭ de malespero?")
- 28-03: Jarfino ĉe La Dompardo, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando; ☎/☎+41/39/267-407; legorondojn gvidas Perla Martinelli kaj Giorgio Silber)
- 29-02: Budapeŝta silvestro, Hungario (Esperur, P.f. 193, HU-1368 Budapest, Hungario; ☎+36/1/133-43-43, ☎268-03-31)

1996

januaro

- 03-09: Aŭstralio kaj Nov-Zelanda Kun-kongreso, Aŭklando, Nov-Zelando (Brian Fox, 634 South Titirangi Rd, Titirangi, NZ-1007 Auckland)
- 08-01 marto: Kursoj por komencantoj, Karlskoga, Svedio (Karlskoga Folkhögskola, Lars

- Forsman, Box 192, SE-691 24 Karlskoga; ☎+46/586/50-360; ☎37-077)
- 15-27: 12-a Aŭstralio E-Somerlernejo, Aŭstralio (Max Wearing, 30 Westbury Street, Hackney SA, 5069)

februaro

- 12-17: Tria Amerika E-Kongreso, San José, Kostariko (Jorge Antonio Leoni de León, Apartado 7603-1000, San José; ☎+506/231-41-67; ☎jleoni@cariari.ucr.ac.cr; temo: "Esperanto kaj la rilatoj Nordo-Sudo en Ameriko")



39-a Internacia Seminario de Germana E-Junularo.

27 decembro - 3 januaro, Germanio
Temo: "Perforto"

marto

- 07-09: 2-a Nacia Kongreso de Kuba E-Asocio, Havano (Kuba E-Asocio, Apartado 5120, CU-10500 La Habana)
- 15-17: Porinstruista seminario, Heerlen, Nederlando (Nederlanda Grupo de Geinstruistoj pri E-o, Middenweg 587, 1704 BH Heerhugowaard; ☎+31/72/571-79-18; temoj: "Instruado al rifuĝintoj, Aŭdvidaj instrumentoj")
- 16-23: TEJO/KER-seminario, Conamara, Irlando (Daithí O' hÉalaithe, 54 Páirc Éabhóra, Beann Éadair Co. Bh.Á.C.; ☎+353/1/832-40-87; ☎dhealy@vax1.tcd.ie; temo: "Paŝi malpeze sur la tero — junularo kaj ekologio")

aprilo

- 01-08: 12-a Printempa Semajno Internacia, Duderstadt, Germanio (Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11,

DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler; ☎+49/2641/4885; ☎2641/978-666)

- 03-08: Unua Albana E-Kongreso, Durrës (Trond Øgrim, Trasopvn. 12 B, NO-0671 Oslo, Norvegio; ☎+47/22-77-76-80; ☎trondog@oslonett.no)
- 05-08: 80-a Brita Kongreso de E-o, Saffron Walden (Martin Howard, Webbs Cottage, Woolpits Road, Great Saling, Braintree, Essex, CM7 5DZ Britio; ☎/☎+44/371/850-423)
- 06-08: 51-a Kongreso de SAT-Amikaro, Orly, Francio (SAT-Amikaro, 67 ave. Gambetta, FR-75020 Paris)

majo

- 11-18: 48-a Kongreso de Internacia Fervoja E-Federacio, Hago, Nederlando (48-a IFEF-Kongreso, Postbus 11686, NL-2502 AR Den Haag; temo: "La evoluo de trafik-regado en Amsterdamo")
- 16-19: 88-a Franca Kongreso de E-o, Liono-Villeurbanne, Francio (CERL, 7 rue Major-Martin, FR-69001 Lyon; ☎+33/78-83-67-08)

junio

- 24-12: 27-a Somera kursaro, San-Francisko, Usono (Cathy Schulze, 410 Darrell Rd., Hillsborough CA 94010; ☎+1/415/342-17-96; instruas Hisasi Kitagawa, Derek Roff, Katalin Smidélusz)

julio

- 08-13: 32-a Brazila Kongreso de E-o, Ribeirão Preto (Brazila E-Ligo, C.P. 3625, BR-70084-970 Brasília - DF; ☎+55/61/226-12-98; temo: "Labori por Esperanto estas labori por paca mondo")
- 13-15: 44-a Kongreso de E-Ligo por Norda Ameriko, Detrojto, Usono (E-Societo Miĉigana, P.O.B 3011, Southfield MI-48037-3011)
- 13-20: 69-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda, Sankt-Peterburgo, Rusio (SAT, 67 ave. Gambetta, FR-75020 Paris)
- 20-26: 62-a Internacia Kongreso de Blindaj E-istoj, Beroun, Ĉeĥio (Jiří Vychodil, Žandovská 304, CZ-190 00 Praha 9)
- 21-28: 81-a Universala Kongreso de Esperanto, Prago, Ĉeĥio (CO de UEA, adreso en la kolofono; temo: "Kulturo: valoro aŭ varo?"; vd. p. 190-91)
- 28-04: 30-a Konferenco de ILEI kaj Kvara Gimnazia Semajno, Tábor, Ĉeĥio (Vladimír Dvořák, Zelenečská 354/20, CZ-19400 Praha; temo: "Rimedo por bona lernado kaj memlernado de Esperanto")
- 29-05: 52-a Internacia Junulara Kongreso, Güntersberge, Germanio (Germana Esperanto-Junularo, Chausseestr. 8, DE-10115 Berlin; ☎/☎+49/30/283-43-20; ☎a2616351@hpw1.rrz.uni-koeln.de; temo: "Formoj de kunvivado")

aŭgusto

- 06-11: Kvina Kultura E-Festivalo, Kopenhago, Danio (Jacob Nordfalk, Radmandsgade 53, 2. th., DK-2200 København Ø; ☎+45/31-83-82-20; ☎nordfalk@fys.ku.dk) ★

Ĉefa agado: savi la vivojn

Ekde la sendependiĝo de Bosnio kaj Hercegovino, en Tampere la unuan fojon povis reprezentiĝi ties esperantistoj en UK. Ŝefik Rizvanović, 50-jara inĝeniero pri elektrotekniko el Sarajevo, sekretario de la landa E-Ligo, rakontis dum la UK:

Por eliri el Sarajevo mi bezonis dek horojn, piede kaj per kamiono, ĝis mi atingis la t.n. liberan zonon. Mi devis trapasi longan tunelon, vilaĝojn, kaj poste supreniri en la montojn ĉirkaŭ Sarajevo. Bonŝance, ŝoforo de kamiono konsentis veturigi min, malgraŭ ke neniun nuntempe ŝatas respondecigi pri la vivo de iu alia. Poste mi ŝipis al Ancona (Italio), trajnis al Romo, kie mi ricevis finnan vizon, kaj fine mi flugis tra Bruselo al Helsinko.


Fakte, kiom da homoj sukcesas eliri el Sarajevo?

Dum la milito malmultaj sukcesas, malmultaj provas, ĉar mankas lokoj en la mondo kien ili entute povus iri. El Bosnio kaj Hercegovino jam foriris 1 200 000 homoj, kiuj fariĝis rifuĝintoj. Ne restas do multaj landoj kiuj akceptas pluajn homojn.

Tamen, al eksterulo ŝajnas ke ĉie aliloke estas pli bone ol en Sarajevo. Malgraŭ tio, vi planas reiri.

Unue mi restos unu semajnon ĉe miaj edzino kaj filino, kiuj vivas en

Slovenio. Poste mi revenos al Sarajevo, ĉar antaŭ la foriro mi decidis kaj preparis min tiel. Certe, oni povas trovi eksterlande aliajn solvojn, sed mi ne deziras vivi en eksterlando kiel neutila homo, al kiu iu pagos iom por travivi, por atendi la finon de la milito. [Rizvanović sciigis la 22-an de aŭgusto



Šefik Rizvanović

ke li sukcesis reatingi Sarajevo. —Red.]

Kiel agas esperantistoj?

Nia ĉefa agado estas savi la vivojn, kaj tio ne estas nura frazo. Ni helpas unu la alian inter esperantistoj. Ni havas kontakton ankaŭ kun familianoj de pereintaj esperantistoj.

Ni ne havas regulajn kunsidojn, estus tro danĝere. En la pasintaj tri jaroj ni ne povis aranĝi tutlandan kunvenon kaj elektojn, tial oni povus diri ke mi estas "milittempa" sekretario en milittempa estraro. Ni komunkaŝas plej volonte telefone aŭ per leteroj. Iuj inter ni laboras en la ŝtata administracio kaj helpas per internaciaj telefonaj kaj telefaksaj lineoj.

Konto Espero de UEA jam dufoje ege helpis al ni. UEA sendis al ni paketojn, kiuj bedaŭrinde vojaĝis ses monatojn de Roterdamo al Sarajevo, sed tamen nin atingis. Poste ni vidis ke estas pli bone akcepti monhelpon, ĉar ĝi pli facile atingas la urbon. Krome, tiel oni ja povas aĉeti tion kion oni vere bezonas. En Sarajevo eblas ja aĉeti, ekzistas iuj nigraj vojoj por la varoj... En la unua sendaĵo, ekzemple, estis laktopulvoro por infanoj. Ne havas ĉiuj malgrandajn infanojn, do ni ĉiuj donis tiun pulvoron al esperantistoj kun infanoj. ★

Kiaj perspektivoj por vidhandikapitoj?

La 61-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE), okazinta en Tuusula, Finnlando (18-21 de julio), havis 77 partoprenantojn el 20 landoj.

Oni dediĉis multan tempon al la Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI, eksperimente aranĝitaj por blinduloj. Sukcesis ses el la ok kandidatoj (du elemente, kvar meze), kaj oni jam interkonsentis reokazigi la ekzamenojn en la venontjara IKBE.

Rilate al la kongresa temo "Vidhandikapitoj en la socio" Otto Prytz (Norvegio) opiniis ke pluraspekto pli malfaciligis esti blindulo en la nuntempa socio, kiu fariĝis pli vida de post la ĝeneraligo de televido. Arvo Karvinen (Finnlando) konkludis ke homoj rilatas ambigue al handikapuloj: negative al handikapo, sed ofte pozitive al la handikapita individuo mem. Maija Könkkölä (Finnlando) raportis pri la

kreskanta konsidero al handikapuloj en la konstrua kaj komunuma planado de sia lando. LIBE-prezidanto Theodor Speckmann (Germanio) skizis la dubajn perspektivojn de profesia laboro por blinduloj, nun kiam la teknika evoluo samtempe kreas kaj malkreas laborlokojn.

Martin Meyer (Svislando) pledis por malfermo de E-kunvenoj al eksteruloj, laŭbezzone eĉ kun interpretado. Pavel Rjabov (Rusio) rakontis pri la sorto de nevidantoj en Ĉeĉenio, kaj Natalija Kasymova (Taĝikio) pri la situacio de vidhandikapitoj en sia lando.

La tuto estis solide aranĝita de Stelero, la Esperanta ligo de finnaj blinduloj, kiu festis sian 75-jariĝon.

La kongresa rezolucio rekomendas ke LIBE iniciatu konferencojn kun Esperanto kiel ĉefa, sed ne sola, laborlingvo, pri temoj interesaj kaj aktualaj, kiuj povus instigi reprezentantojn de blindul-organizaĵoj landaj kaj internaciaj al efektiva partopreno. Tiaj temoj estas ekzemple: aliro de vidhandikapuloj al diversaj kampoj de la socia kaj kultura vivo; internacia normigo de brajlo sur diversaj kampoj; praktika tutmonda solidareco inter handikapuloj.

Sekve al la rezolucio, LIBE organizos jam en aprilo 1996 internacian seminarion pri la unika kaj tamen lastatempe minacata brajloskribo.

Nora Moerbeek (sekretario de LIBE)

Bharato planas ĝis 2000

Post tri jaroj, oni denove E-kongresis en la kontinente granda Hinda Unio. Federacio Esperanto de Bharato (FEB) kunvokis la Sesan Nacian E-Kongreson en Puneo (9-10 septembro).

En la kongresurbo Puneo (Poone), 200 km-ojn oriente de Bombajo, la E-movado kreskis en la pasintaj ok jaroj pro metodoj nekutimaj en aliaj mondpartoj. En 1987 ekagis en Puneo Esperanto-Centro HELPO, fondita de la nuna FEB-prezidanto Abdul Salam. Konforme al sia nomo, la Centro helpas bezonantojn pri eduko, sano, higieno, nutrado, labor-trovo ktp. Kvankam HELPO (171, M.G. Road, Poone - 411 001 Hinda Unio) ne instruas E-on rekte, ĝi povas bone uzi ricevatajn lerno- kaj instru-materialojn, ĉar ofte ĝiaj helpitoj

ekdeziras lerni E-on. Tiujn petojn oni povas tuj plenumi, ja en Puneo oni instruas Ĉe-metode en kvin lokoj.

Kongreso de kontinento

La kongreson gastigis la Universitato de Puneo. Antaŭ ĉirkaŭ 150 delegitoj, salutis rektoro prof. Subhash Chandra Bhosale; vicrektoro prof. B. D. Chaure anoncis ke la universitato konsideras enkonduki Esperanto-kurson en la instruplanon. Prof. Lachman M. Khubchandani, mondfama lingvisto, akcentis ke E-o estas

lingvo por la ordinara homo, kaj ĝia movado — movado por la homaro.


En la inaŭguro, Salam resumis la evoluon de la E-movado ekde la fondo de FEB en 1982. De post la lasta kongreso en 1992, bone kreskis precipe la FEB-filioj en Bangaloro (kie en majo Ŝ.P. Tekur gvidis senpagan kurson por 75 homoj), Tirupati, Kalkato, Lakno (Lucknow), Madraso kaj Puneo.

Post prezentado de kamparaj esperantistinoj el Sayadnagar, salutis delegitoj — ankaŭ el Belgio (vd. la foton), Irano kaj Srilanko. Sekvis diskutoj pri taŭgaj metodoj por disvastigi E-on antaŭ la jaro 2000. Tiaj diskutoj tre necesas ĉar — laŭ Salam — “Hinda Unio ne estas unu lando sed unu kontinento . . . unuigita politike; sed etne, kulture, psikologie, religie kaj lingve la diversaj ŝtatoj funde malsimilas.”

La ĝenerala asembleo de FEB decidis ke la organizaĵo estu registrita en Puneo. En la estrara elekto prezidanto restis Abdul Salam, vicprezidanto Sam Syundar Pal, kaj sekretario P. V. Ranganayakulu; kasisto fariĝis s-ino Urmila Bhana. FEB planas — depende de siaj rimedoj — eldoni vortaron de Ranganayakulu kaj establi E-informocentron en Puneo, kaj peti aliĝon kiel landa asocio de UEA.

Laŭ pluraj raportoj

José Starck salutas la kongreson. Maldekstre, kun blindulbastono: Abdul Salam.



Kio estas granda homo?

La prelegoj de la ĉi-jara Internacia Esperanto-Konferenco (15-21 julio, Varsovio) traktis esperantisman temon, nian historion, tra la personeco de Ivo Lapenna.

“Ivo Lapenna kiel artisto”: Zofia Banet-Fornalowa rivelis ne sufiĉe konatan flankon lian. Li estis ne nur instiganto de Internaciaj Artaj Festivaloj, sed artisto mem, profesinivela violonĉelisto kiu decidis sekvi la juristan vojon por povi agadi laŭ siaj idealoj, favore al la homaro. Ankaŭ sian oratorecon, kaj la publikon, li traktis kiel artisto.

Por rememorigi al ni la forton de la retoriko de “La homo kaj la amiko”, Günther Becker citis frazeton lian de 1954, pri “la verda standardo, nian makulita de homa sango”, preparolis lian verkon *Retoriko*, kaj spektigis vidbendon de lia lasta parolado.

Birthe Lapenna prelegis en rekta kaj malkaŝa stilo pri la fontoj de “La puĉo en UEA dum la UK en Hamburgo”, pri la motivoj de la malfiduloj, la influo de “kunvojaĝantoj”, la partopreno de enviaj personoj . . . Kortuŝa momento estis kiam ŝi deklaris ke “neniam antaŭ kaj ekster la movado estis malamiko de li”.

“Ivo Lapenna, homo minaca ĉar efektive libera”: Tyburcusz Tyblewski analizis i.a. la impresojn kiujn povis lasi Lapenna ĉe diversaj homoj. Li mem ege admiris tiun kiu, dum la malfermo de la UK de 1966, redonis al li, t.n. orient-eŭropano, klarvidon pri la propra libereco.

Bruno Masala spuris “La humaniston Lapenna”, la distingon inter la “interna ideo” de la mistika Zamenhof kaj la “humaneca internaciismo” de Lapenna.

La prelego de Klaus Perko science kaj detale prezentis prof. Lapenna, la juriston: jen lian universitatan karieron kiel mondfama fakulo pri sovetia kaj orient-eŭropa juro, jen lian verkadon kaj agadon en la E-movado.

Eugène de Zilah elmetis la demandon, “Kio estas granda homo?” Fameco ne sufiĉas por difini grandulon; pli grava signo estas lia influo ekster la propraj fako kaj tempo.

Fine de la konferenco, la Ĝenerala Asembleo de OSIEK atribuis sian premion en 1995 al Donald Broadribb, por lia traduko, el la malnovgreka, de *La Respubliko* de Platono.

Ivor Hueting (Britio)

kaj Bruno Masala (Francio)

81-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO Prago (Ĉeĥa Respubliko) 21-28 julio 1996

Foto: Miroslav Krob

Konstanta adreso

81-a UK de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Adreso de LKK

81-a UK de Esperanto, P.K. 1069, CZ-111 21 Praha 1, Ĉeĥa Respubliko.

Kongresaj lando kaj urbo

Kun areo de preskaŭ 80 000 km² kaj loĝantaro de iom pli ol 10 milionoj, la Ĉeĥa Respubliko ene de siaj nunaj limoj estas unu el la plej novaj ŝtatoj de Eŭropo. Ĝi establiĝis antaŭ malpli ol tri jaroj (komence de 1993), post la dividiĝo de la antaŭa Ĉeĥoslovakio (mem kreita nur en 1918) en du apartajn ŝtatojn. La historio de tiu parto de Eŭropo etendiĝas tamen tra multaj jarcentoj, kiel abunde atestas la ĉefurbo Prago, unu el la plej fascinaj — kaj en la lastaj jaroj plej vizitataj — urboj de Eŭropo. Pluraj aliaj landoj kaj urboj pretendas esti meze de Eŭropo, sed la Ĉeĥa Respubliko kaj Prago simple estas tie: ne nur geografie kaj historie, sed ankaŭ kulture, trafike kaj turisme. Pro tio la 81-a UK, okazonta 75 jarojn post la sola antaŭa UK en tiuj lando kaj urbo, fariĝos sendube granda kaj ĉeestinda evento.

Aliĝilo, afiŝo, Unua Bulteno

Ili aperis kaj vaste distribuiĝis tra la E-movado. Restas ankoraŭ sufiĉa kvanto ĉe la konstanta adreso por plenumi viajn eventualajn bezonojn. La aliĝilo kaj la Unua Bulteno (riĉe, plenkolora ilustrita prospekto pri la kongresa urbo) estas senpagaj, dum la grandformata kolora afiŝo kostas 3 guldenojn (pro la alta afranko). Por la kongresanoj el la Ĉeĥa Respubliko kaj el Slovakio aperis aparta aliĝilo kun specialaj kotizoj en ĉeĥaj kronoj.

Kongresejo

La Kongresa Centro de Prago (antaŭe: Palaco de Kulturo) gastigos ĉiujn programerojn de la 81-a UK. Temas pri impona 5-etaĝa, moderne ekipita kongresejo kaj koncertejo kun suma areo de preskaŭ 35 000 m². Ĝia ĉefa salonego povas sidigi 3000 homojn, dum en la aliaj salonoj estas loko por pliaj 2000. La unika situo sur monteto super la rivero Vltava, kun majesta panoramo de la urbo, donas apartan karakterizon al la ĉiurilate konvena kongresejo. La metroa haltejo Vyšehrad (du haltejojn for de la urbocentro) troviĝas apude.

Kongresa temo

Diversaj prelegoj, diskutoj kaj aliaj programeroj traktos la ĉeftemon de la 81-a UK: “Kulturo — valoro aŭ varo?”

Loka Kongresa Komitato

Ĝi jam delonge funkcias, sub la gvido de inĝ. Vlastimil Kočvara, prezidanto de Ĉeĥa E-Asocio kaj malnova komitatano de UEA. Kiel en multaj aliaj kongresurboj lastatempe, ankaŭ en Prago LKK estas pli landa ol loka, kion faciligas la modernaj komunikiloj. Jen la nomoj de la aliaj LKK-membroj: Květa Hubnová (vicprezidanto, loĝigo), Pavel Polnický (financo), Zdeněk Pluhař (sekretario), Eva Řiháčková (informado), Jindřich Ondráček (kongresejo), Lucie Karešová (junulara programo), Vlasta Janáková (infana kongreseto), Věra Podhradská (helpantoj, giĉetoj), Jiří Vychodil (handikapuloj), prof. d-ro Vlastimil Novobilský (Internacia Kongresa Universitato). Cetere, prof. Novobilský estas rektoro de la Universitato en Ústí nad Labem kaj rolos kiel rektoro de IKU (vd. okt., p. 164).

Loĝado

Prago nun jam havas grandan hotelkapaciton en ĉiuj kategorioj. Helpas ankaŭ ke la fino de julio ne estas la

turisma ĉefsezono en Prago, tiel ke oni sukcesis rezervi sufiĉe da ĉambroj. Kompleta listo de hoteloj kun definitivaj prezoj aperos en la Dua Bulteno, distribuota meze de januaro 1996. Por via informiĝo, jen kelkaj proksimumaj prezoj en guldenoj (ĉiuj kun matenmanĝo; *d* = en dultita ĉambro, *u* = en unultita ĉambro): studenta hotelo urbo-centre 35 (*d*); dustela hotelo 48 (*d*), 60 (*u*); tristela hotelo 60 (*d*), 85 (*u*); kvarstela hotelo 90 (*d*), 160 (*u*); kvinstela hotelo 170 (*d*), 260 (*u*). Du hoteloj meritas apartan atenton: la luksa Hotelo Forum troviĝas tuj apud la kongresejo kaj ĝi disponigos al la UK 250 ĉambrojn kontraŭ jenaj prezoj: 125 (*d*), 195 (*u*); unu el la plej novaj kaj plej komfortaj pragraj hoteloj, Atrium Hilton, kun rekta metroa linio (4 haltejoj) al la kongresejo, rabatis siajn prezojn jene: 110 (*d*), 180 (*u*). En la plena hotellisto aperos pliaj prezonuancoj. Kiel kutime, LKK provos organizi ankaŭ amasloĝejon, sed ĉi-foje ekskluzive por gejunuloj.

Ekskursoj

Estas planitaj pluraj duontagaj, vesperaj kaj tuttagaj ekskursoj. Ili celas la plej vizitindajn lokojn en la ora Prago, en ĝia pitoreska ĉirkaŭaĵo kaj en la historie kaj kulture riĉa lando. Ne eblas ĉi tie listigi ĉiujn ekskurs-lokojn, sed ni menciuj la tuttagan ekskurson al Karlovy Vary, eble la plej fama ĉeĥa turismejo post Prago. Por ebligi partoprenon ankaŭ al tiuj kun malpli da mono, ĝi ne inkluzivas tagmanĝon kaj kostos ĉ. 55 gld. Alia ekskurso estas planita por handicapitaj kaj maljunaj kongresanoj.

Antaŭkongreson gastigos la dua plej granda urbo, Brno, kun i.a. ekskurso al Slovakio. Inter la 4 postkongresaj vojaĝoj elstaras tiu kiu vizitos la "magian triangulon" de Prago-Krakovo-Dresdeno.

Infana Kongreseto

Ĝi okazos samtempe kun la 81-a UK, sed kvindekono da kilometroj sude de Prago, en Rabyně, ĉe la bordo de pitoreska riverlago. Ĝia riĉa programo inkluzivas kompletan restadon (tranoktoj plus 5 manĝojn kaj manĝetojn tage), du tuttagajn ekskursojn, transporton de kaj al la kongresejo en Prago. La prezo tamen estos nur ĉ. 380 gld. por la tuta semajno. Interesitoj skribu, kun detaloj pri siaj infanoj, al la komisiito: s-ro Christopher Fettes, St. Columba's College, Rathfarnham, Dublin 14, Irlando.

Vojaĝagentejo

La oficiala turisma agentejo de la Kongreso estas Ĉedok, la plej granda kaj plej renoma ĉeĥa turisma kompanio. Ĝi okupiĝos pri ĉiuj loĝigaj kaj ekskursaj programoj kaj helpos pri ĉiaspecaj praktikaj problemoj surloka. Tamen, ĉiuj kongresaj servoj de Ĉedok estas mendeblaj nur pere de la konstanta UK-adreso en Roterdamo.

Kotizoj kaj aliĝoj

Ĝis la fino de 1995 validas jenaj favoraj kongreskotizoj en guldenoj (interkrampe la rabatitaj kotizoj por la landoj kun tarifo B): individua membro de UEA (IM) 215 (162); ne-IM 270 (202); komitatano/kunulo/junulo/handikapulo mem IM 107 (81); kunulo/junulo/handikapulo ne-IM 162 (121). Por ĝui la rabaton de individua membro necesas samtempe kotizi por la jaro 1996, atentante ke la plej malaltkosta kategorio "Membro kun Gvidlibro" ne rajtigas al la rabato. Ĝis la mezo de oktobro al la UK jam aliĝis 320 kongresanoj.

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 1996

La Belartaj Konkursoj de UEA ricevas ĉi-foje ekstran fascinan pro la urbo kie oni kronos la laŭreatojn: Prago, unu el la historiaj metropoloj de literaturo kaj aliaj artoj. Plian fascinan donas la nekutima grandeco kiun oni antaŭvidas por la Praga Universala Kongreso. Ankaŭ la kongresa temo ligiĝas al Kulturo: "Kulturo — valoro aŭ varo?"

Ĉu en tiaj kadroj la Belartaj Konkursoj spertos en 1996 unu el siaj plej fekundaj jaroj? Tion esperas la organizantoj, kiuj denove invitas kreemajn esperantistojn al partopreno en la plej prestiĝa kaj vivipova belarta institucio de Esperanto.

Ĉiuj konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, ne publikigitaj en presa aŭ alia formo. Krome validas jenaj kondiĉoj:

Poezio: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo 200 x 65 tajpospacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Eseo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la 81-a UK: "Kulturo — valoro aŭ varo?". Tri premioj, el kiuj la unua nomiĝas "Luigi Minnaja".

Kanto: Teksto kaj melodio povas esti de malsamaj aŭtoroj. Eblas sendi la melodiojn surpapere aŭ sonbende. Tri premioj, el kiuj la unua nomiĝas "An-Song-san".

Vidbendo: Temo prefere ligita kun Esperanto. Maksimuma daŭro 30 minutoj. Sistema VHS/PAL. Tri premioj.

Infanlibro de la Jaro: Originala aŭ tradukita libro, presforme aperinta en 1995. Unu premio.

Sendo: Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 1996. Por vidbendo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 1996. Ĉion oni adresu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.


La konkursaĵoj (krom vidbendoj kaj infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La vera nomo kaj adreso estu en aparta koverto. Se eble, oni aldonu 5 internaciajn respondokuponojn por ĉiu branĉo en kiu oni konkuras.

Premioj: Unua premio: 390 gld. Dua premio: 273 gld. Tria premio: 156 gld. Nova Talento (por la plej bona konkursanto antaŭe ne premiita): 273 gld. Infanlibro: 819 gld.

Publikigo: La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologio de la Konkursoj.

Detala regularo haveblas kontraŭ unu respondkupono.

Recenzoj



Kiel infano iĝas dulingva?

Denaska dulingveco. Konsiloj por gepatroj. Red. Renato Corsetti. Roterdamo: UEA, 1993. Kajeroj por multlingveco 1. 21p. 29cm. 7,20 gld.
Dulingve — pli simple. Ernő Csiszár. Roterdamo: UEA, 1995. Kajeroj por multlingveco 2. 86p. 29cm. 10,50 gld.

Du ege utilaj libroj, de du aŭtoroj kiuj ne nur ĝisfunde studis la ampleksan fenomenon de dulingveco, sed mem uzas Esperanton kiel familian lingvon. *Denaska dulingveco* baziĝas sur aŭstralia originalo kiu celas gepatrojn dezirantajn eduki siajn infanojn dulingve, sed ĝi estas adaptita kaj pliriĉigita de Renato Corsetti per siaj propraj spertoj kaj studoj. Tiu mallonga libro estas tre klare kaj bele redaktita, kaj ne tro pritraktas teoriajn aspektojn de dulingveco. Antaŭ ĉio ĝi celas doni praktikajn konsilojn al gepatroj kaj enhavas sekciojn kiel “Dulingveco: la fono”; “Kiel viaj infanoj povas iĝi dulingvaj?”; “Kio estas ‘normala’ en dulingva lernado?”; “Kio estas lingva interfero?”; “Kio estas lingvo-ŝaltado?”. La tria parto

(“Kion gepatroj povas fari?”) konsistas el konkretaj konsiloj por gepatroj. Estas tre valoraj gvidlinioj



Nora kaj Palma Csiszár,
la heroinetoj de *Dulingve — pli simple*.

pri strategioj “por superi krizopunktojn”, kiel kiam la infano rezistas paroli en la alia lingvo aŭ miksas

lingvojn, aŭ respondas nur en la loka lingvo. La libreto finiĝas per librolisto por plua legado kaj adresoj por mendi, i.a. du praktikajn konsilrevuojn pri la ĉiutagaj problemoj de dulingvaj familioj.

Kiel skribas Corsetti en pensiga postparolo al *Dulingve — pli simple*, ĉi tiu estas verŝajne la unua libroforma verko pri kazo de denaska dulingva edukado en kiu Esperanto rolas kiel unu el la lingvoj. Ĝi celas priskribi la sukcesan dulingvan edukadon de la du filinoj de la familio Csiszár, Nora kaj Palma, dum proksimume iliaj unuaj ses vivjaroj, kaj ĝi volas instigi aliajn Elingvajn gepatrojn fari same. Temas pri samnaciaj hungaraj gepatroj. La patro parolas ĉiam Esperante kun la filinoj — la patrino hungare. La aŭtoro pritraktas la dulingvecon ĝenerale, psikologiajn faktorojn, la evoluon de la parolado de etinfanoj, Esperanton kiel ludilon kaj internacian komunikilon, kaj la infanajn kreokapablon kaj penso- kaj sento-esprimojn. Kiel irlandanon, aparte interesis min la sekcio pri la neatingebleco de plena socia dulingveco — la praktika 75-jara sperto de sendependa irlanda ŝtato, kiu celis (kaj oficiale celas) atingi tian dulingvan staton, plie pravigas ke “estas utopia la kredo, ke la lernejo iam produktos amase du- kaj trilingvulojn”.

Seán Ó Riain (Irlando/Pollando)

Talento malŝparata

Glozel kaj la prahistoria skribo. 132p. 21cm. 29,70 gld. **Kaj la suno haltis... Katastrofismo en la folkloro de la popoloj.** 74p. 21cm. 14,70 gld.
Le Plessis-Bourré kaj alĥemio. 40p. 21cm. 12,00 gld. André Cherpillod. Courgenard: la aŭtoro, 1991, resp. 1993 kaj 1993.

André Cherpillod daŭre malŝparas siajn talenton kaj laboremon en serio da studoj kiuj havas intereson, mi supozas, tre relativan por la ĝenerala publiko. Tio ne signifas ke al mi ne plaĉis tiuj ĉi tri publikigaĵoj. Male! Krome, mi estas de longe admiranto de lia leksikografia laboro (kiel *Nepivaj vortoj* kaj ĉefe *Mil ekzotaj vortoj*).

Ĝuste Esperanto bezonas kompetentulojn kiel li, kaj nur pro tio mi bedaŭras ke li disperiĝas en verkoj kiel la nunaj. Mi ja tre ŝatis relegi pri la strangaj Glozel-aj misteroj en detala historia sintezo. Same, en *Kaj la suno haltis...*, plaĉis al mi sekvi la tratempan vojaĝon de Cherpillod, dum kiu li ĉerpas pruvojn pri katastrofismo en la folkloro kaj oldaj

libroj de multaj popoloj, kaj rememorigas serion da neklarigitaj fenomenoj ekde la bibliaj tempoj. Kaj fine, en *Le Plessis-Bourré kaj alĥemio*, li prezentas la historion de franca palaco kaj ĝia konstruinto, laŭdire fama alĥemiisto, regalante nin per malgranda, tre rigora historio de tiu pra-scienco.

Eble Cherpillod estas tre feliĉa kiam li laboras pri studoj kiel tiuj ĉi. Sed mi suspektas ke okupiĝo pri tiuj malortodoksaj temoj probable malhelpis la aŭtoron esti akceptata en la franca kultura mondo, malgraŭ liaj kompetenteco kaj laboremo. Tamen la esperantistoj devas senti sin feliĉaj ke tia intelektulo estas inter ni — kaj oni devus stimuli lin uzi siajn sciojn kaj kapablojn pli profitdone por ni.

Manuel de Seabra (Barcelono)

Ĝustigoj: 1) En aprilo (p. 62) aperis bibliografio de la verkaro de Fernando de Diego. Mankis mencio ke ĝi estis ellaborita de Reinhard Haupenthal.
2) La telefaksaj numeroj de Radio Sarajevo (jul-aŭg., p. 129) estas +387/71/455-141 kaj 445-855 (ne 455-855).

Taglibro de filozofa mar-hundo

Vivi sur barko. Eugène de Zilah. Cannes et Clairan: Jean-Claude Bernard, 1994. 235p. 21cm. Ilus. Serio Kargo. 49,50 gld.

Pardonu ke tuj ĉe la komenco mi mencias la aspekton de la libro: ja temas pri unu el la plej zorge kaj bele fabrikitaj libroj de la lastaj jaroj. La teksto estas kompostita laŭ tradicia maniero; la dukolora preso estas ne ofseta, sed tiu de Gutenberg; la mane ĉerpita papero havas naturkoloran nuancon. Kurte, jen libro kiu troviĝas lokon ne nur sur la bretaro de literatur-amantoj, sed ankaŭ de bibliofiloj kaj nostalgiuloj.

Vivi sur barko estas speco de taglibro de Eugène de Zilah, filozofo kaj sanskritisto, konata pro liaj artikoloj en *La Gazeto* kaj lia aktivado kadre de la Internaciaj Esperanto-Konferencoj.

Kiam alvenis "naŭza tago" en lian vivon, "la unua de [lia] 51a vivojaro", la aŭtoro decidis forlasi ĉion, por vivi kune kun sia edzino Lena sur velŝipo. Romantike, ĉu ne? Sed forlasu viajn ter-ratajn revojn, ĉar la surmara vivo estas alia! *Vivi sur barko* estas dure kaj resignoplene; oni iel reduktiĝas al la bazaj funkcioj de la vivo. Kaj ĝuste tion bezonis la taglibristo, kiu — ekabomenante la saturantan burĝan vivon kiu kondukas tro facile al falsa kontento — klopodas solvi la problemojn kiujn maro kaj boato al li trudis. Tiel la leganto ĉeestas serion da komikaj, pensigaj kaj ankaŭ dramaj aventuroj kaj eventoj, kiun sperti povas nur mar-hundo.

Malgraŭ la iom amorfa ĝenro "taglibro", de Zilah —

Eugène de Zilah
stiras sian barkon
inter komikaj, pensigaj
kaj dramaj aventuroj.




Foto: Madeleine de Zilah

Bildriĉa debuto

Interrilatoj. Aira Kankkunen. Gotenburgo: la aŭtoro, 1993. 89p. 21cm. 13,80 gld.

Trafa titolo de debuta poemaro de finnino, kiu cetere jam estas konata pro beletraĵoj kaj faklibroj pri infan-aŭdologio en la gepatra lingvo. Ja temas pri rilatoj inter homo kaj naturo, inter homoj. Liberforme, en simplaj vortoj la poetino peras al ni siajn observojn kaj meditojn ĉefe pri ĉiutagaĵoj. Bildriĉe ŝi envortigas kion multaj el ni sentis, spertis. Tial ŝiaj poemoj tuj kaptas onin kaj fascinite oni legas ĉi tiun unuan, espereble ne lastan poemaron de Aira Kankkunen.

Rejna de Jong (Nederlando)

bone sciante la verkistan metion — sukcesas fari koheran kaj ekvilibrantan tutaĵon el rakontaj kaj eseaj partoj en stilo riĉa kaj varia. Ĝuste la esea elemento estas grava en ĉi libro: kiam la aŭtoro, parolante pri la rolo de Esperanto (p. 34-35), komunikas optimismajn perspektivojn al tiuj kiuj rezignas en la trista movada kaĉo, li faras al mi apetiton legi tutan esearon de li. Mi esperas ke foje io tia aperos. Dume mi deziras al J.-C. Bernard ke li sukcesu eldoni ankoraŭ multajn librojn de la serio Kargo, en simila bibliofila kvalito.

Herbert Mayer (Aŭstrio)

Mildaj voĉoj plenigas vakuon

Ĉu vi aŭdis, ke... Katalin Smidélus. Szombathely: la aŭtoro, 1994 (dua, korektita eldono). 65p. Libro + kasedo. 36,30 gld.

Ĉiuj scias ke la parolado, kvankam pli grava ol la skribado, ŝajnas iom neglektata de multaj E-instruistoj. Oni do troviĝas metodojn por tuj paroligi la lernantojn, kaj igi ilin kompreni aliajn personojn. Tial oni devas ankaŭ lerni kiel kompreni aŭdatan tekston. La Internacia Ekzameno de ILEI/UEA ne pretervidas tion: ĝiaj testoj inkluzivas ekzercon pri kompreno de teksto aŭdata/legata. S-ino Katalin Smidélus samopinias pri la graveco de aŭda kompreno; ŝi tial disponigas al la tuta esperantistaro praktikan helpilon.

La lernilo ne instruas pri gramatiko, sed proponas ekzercojn por elprovisian aŭdan kompren-kapablon. La enhavo konsistas el tekstoj verkita de la aŭtorino, novaĵoj el radio kaj el la magazino *Monato*, i.a. pri vegetara vivmaniero, la potenco de reklamado, "almozkupon", "Telefonokarto limigas vandalismon", "Dum unu semajno en dudek-metra put", horoskopoj ktp.

Voĉoj ne-unutonaj kaj mildaj aŭdigas la tekstojn de la kasedo, kaj la lernanto, poste, respondas la demandojn de la akompana libreto. La lernilo estas kompleta, ĉar en la libreto troviĝas la tekstoj de la kasedo, la respondoj de la demandoj ktp. Eĉ tiu kiu ne posedas magnetofonon, povas leg(ig)i la tekstojn, kaj poste respondi la demandojn.

La lernilo de la Cseh-instruistino Katalin Smidélus plenigas grandan vakuon, mankon de tiaj lerniloj. Estas evidente ke ĝin posedu ĉiu esperantisto, lernanto aŭ instruisto.

GBEGLO Koffi (Toglando)



Estas tempo rekotizi por 1996!

Frua pago certigas la kontinuecon en la ricevado de ĉi tiu revuo. Krome, ĝi helpas la laboron de la Centra Oficejo kaj ŝparas monon al UEA. *Antaŭdankon!*

Trovi la lastajn inkunablojn

En julio 1995, 108 jarojn post la Unua Libro, aperis la 17-a volumo de la serio Ludovikologia Dokumentaro (LD): Spikumaĵoj II. Sub tiu ĉi titolo kaŝiĝas grandioza kulturevento ne sufiĉe rimarkata.

La japana esperantologo ITÔ Kanzi, post la eldono de la kompleta verkaro de Zamenhof, entreprenis rehavigi ĉiujn E-broŝurojn aperintajn antaŭ 1900, la t.n. *inkunablojn de Esperanto*. Preskaŭ ĉiuj 118 inkunabloj retroviĝis kaj aperis faksimile en la LD-serio. Preskaŭ, sed ankoraŭ ne ĉiuj. En la ĵusa volumo (p. 527) ITÔ starigas du listojn de serĉataj titoloj. Ĉu legantoj helpas nin trovi la originalojn?

Verkoj ankoraŭ tute ne trovitaj: n-roj 32, 42, 50, 65 kaj 102. (Ĉi numeroj rilatas al la t.n. Nomaroj de Zamenhof.)

Unuaj eldonoj serĉataj (postaj eldonoj konatas kaj jam aperis faksimile): n-roj 52, 53, 68 kaj 110. (Intertempe 68 kaj 110 estis elspuritaj.)

32. Marietta Frollo: *Esperanto. Dictionar international pentru români.*

/Varsovio: Kelter, 1889./ Vortaro por rumanoj. 1 folio grand-formata. (Kp. BE, p. 18; BIL 2971.)

Kredeble unuopa folio A3, simila al tiuj aldonitaj al la diversaj Unuaj Libroj. Nek la Universitata Biblioteko de Varsovio (UBV) nek tiu de Bukareŝto posedas ĝin. *Davidov* ne listigas ĝin. Ĉu trovebla en pola aŭ rumana arkivo aŭ biblioteko?

42. L. Zamenhof: *Wörterbuch der internationalen Esperanto-Sprache. Deutsch-internationaler Theil.* /Varsovio?/ Meza vortaro germana-inter-nacia. 1891. 66 p. (Kp. BE, p. 21; BIL 2423.)

Davidov ne konas, UBV ne posedas ĝin. Mi mem emas supozi ke ĉi verko neniam aperis, tamen necesas plua serĉo. Oni memoru ke Zamenhof komence ortografis sian nomon "Samenhof" kaj uzis la pseŭdonimon D-ro Esperanto.

50. V.L. Kravcov: *Vsjemirnoje djelo.* ("Internacia entrepreno.") /Boguĉar?/

1891. 46 p. (?) (BE, p. 23; ne en BIL nek en *Davidov*.)

Ĉu rusaj e-istoj elfosos ĉi relikvon?

65. L.L. Zamenhof: *Novaj esperantistoj.* Serio XIV. (De 1./IV. 1893 ĝis 1./VII. 1893.) Nürnberg: Tümmel, 1893. 8 p. (BE, p. 27; BIL 5287; *Davidov*, p. 109.)

En germanaj bibliotekoj ĝi nenie troviĝas, sed sendube ĝi ekzistis.

102. Aleksandro Zakrjevski: *Regularo por la komencantaj fotografistoj.* Loko? 1896. ? p. (BE, p. 37; BIL 5023; ne en *Davidov*.)

BIL atribuas ĝin al Adam Zakrzewski, sed ŝajne temas pri du malsamaj aŭtoroj. Esploru precipe polaj kaj rusaj esperantistoj.

52. L.L. Zamenhof: *The universal language Esperanto. Complete instruction book with two vocabularies, translated after the Russian of Dr. L. Samenhof by R.H. Geoghegan.* Nürnberg: Tümmel, 1892. 76 p. (BE, p. 24; BIL 1859.)

Davidov konas nur la eldonon de 1898. En germanaj bibliotekoj ĝi ne troviĝas. La usona katalogo NUC (National Union Catalogue) ne konas ĝin. Anglaj kaj usonaj bibliotekoj estas traserĉindaj sub la nomoj Samenhof/Zamenhof kaj/aŭ Geoghegan.

53. L. de Beaufront: *Manuel complet de la langue internationale Esperanto avec double vocabulaire.* Epernay, 1892. 155 p. (BE, p. 24; BIL 2084.)

Laŭ BIL ĝi aperis en Epernay, sed presiĝis ĉe Tümmel en Nürnberg. *Davidov* (p. 4) parolas eĉ pri du eldonoj sam-jaraj en Epernay kaj Nürnberg. Necesus esplori precipe en Francio.

Jen la listo. La regulaj kunlaborantoj de ITÔ Kanzi faris sian eblon. Nun la tuta kapabla esperantistaro devus peni por trovi ĉi lastajn inkunablojn, eĉ se la komuna forto-streĉo restus senrezulta. Tiam, kaj nur tiam, ĉi inkunabloj niaj efektive apartenos definitive al la regno de la fantomoj.

BE = Bibliografio de Esperanto. Parto unua. Libroj verkitaj en Esperanto aŭ pri Esperanto. Vol. unua. Bibliografiaj notetoj pri libroj publikigitaj de 1887 ĝis 1903. Paris: Esperantista Centra Oficejo, 1912. IX, 106 p.

BIL = P.E. Stojan: *Bibliografio de Internacia Lingvo.* Hildesheim, New York: Olms, 1973. 560 p. (Repr. de la eld. Genève, 1929.)

Davidov = Bibliografio. 1. Katalogo de la biblioteko (1888-1911) de Georg Davidov-Saratov. Wolfenbüttel: Heckner, 1911. VIII, 129 p.

Reinhard Hauptenthal (Schulstr. 30, DE-66133 Saarbrücken, Germanio; tel. +49/(0)681/811-653; fakso 816-713)


Abontarifoj 1996 de la Libroservo de UEA

prezoj en nederlandaj guldenoj

Revuo	n-roj jare	jar- tarifo	Revuo	n-roj jare	jar- tarifo
Boletín (hispana)	6	50,00	Juna Amiko (por lernejanaro)	4	19,00
Brazila Heroldo (aere)	12	54,00	Kancerkliniko, La (ajnistaj)	5	42,00
Brazila Esperantisto	4	33,00	<i>aerpoŝta aldono</i>		8,00
Brita Esperantisto, La	6	32,00	Koncize (okc.-eŭropa junularo)	6	18,00
<i>aerpoŝta aldono</i>		9,00	Language Problems and		
Bulgara Esperantisto	6	25,00	Language Planning	3	72,00
Dia Regno (KELI) (aere)	12	21,00	<i>institucioj</i>		157,00
Ekonomia Bulteno pri Usono	12	25,00	Lanterno Azia, La (korea, aere)	11	45,00
El Popola Ĉinio (aere)	12	51,00	Literatura Foiro	6	62,00
Esperanto, L' (itala)	9	43,00	<i>aerpoŝta aldono</i>		18,00
<i>aerpoŝta aldono</i>		6,00	Medicina Internacia Revuo		
Esperanto sub la Suda Kruco			(aere)	3	25,00
(aŭstralia-novzelandaj, aere)	6	50,00	Monato (int. novaĵrevuo)	12	76,00
Esperantolehti (finna)	6	26,00	<i>aerpoŝta aldono</i>		11,00
Espero, La (sveda)	6	33,00	Monda Forumo (Unesko k.s.)	4	30,00
Espero Katolika (IKUE)	6	65,00	Moskva Gazeto	6	18,00
<i>aerpoŝta aldono</i>		10,00	<i>aerpoŝta aldono</i>		4,00
Fenomeno (nederlanda)	11	30,00	Najtingalo		
Fonto (literatura)	12	45,00	(kaseda songazeto)	2	40,00
Franca Esperantisto	11	63,00	Norvega Esperantisto	6	20,00
Gazeto, La (mondkultura)	6	56,00	Ondo, La (rusa, soci-kultura)	6	24,00
<i>aerpoŝta aldono</i>		10,00	Oomoto	1	20,00
Heroldo de Esperanto	17	55,00	Ruslanda Esperantisto	12	20,00
(<i>aerpoŝta aldono varias laŭlande</i>)			Sennacieca Revuo	1	13,00
ICEM-Esperanto			Sennaciulo	12	52,00
(Freinet-pedagogio)	4	40,00	Simpozio (filozofia)	2	10,00
Internacia Pedagogia Revuo	4	22,00	Starto (ĉeĥa)	6	15,00
Jaro, La (agendo)	1	9,00	TEJO Tutmonde	4	19,50
<i>aerpoŝta aldono</i>		4,00	Tutmondaj Scienco kaj Tekniko	4	27,00

Por mendoj de klientoj loĝantaj en Eŭropa Unio, aldoniĝas Aldonvalora Imposto je 6%.

Laste aperis



Foli- ume



Bibliografio de la verkaro de Reinhard Haupenthal. Esther Haupenthal. Saarbrücken: Iltis, 1995. 51p. ISBN 3-927613-38-X. 21cm. 11,10 gld.

Fantaziaĵoj kaj kantoj por infanoj. Jon Rømmesmo (1923). Budapeŝto: ILEI, 1995. 97p. 29cm. Pli ol 50 kantoj kaj dudeko da fantaziaj rimaoj, por la 6-jara nepo de la aŭtoro. 15,00 gld.

Floroj de l' krepusko, La. Serĝo Elgo. Prilly: LF-Koop, 1995. 168p. ISBN 3-906595-08-0. 21cm. La tria krimromano de la aŭtoro: inspektoro Kramer enketas pri junaj teroristoj. 29,10 gld.

La interna vivo de Esperanto. Eseoj. Karolo Piĉ (1920-1995). Saarbrücken: Iltis, 1995. 401p. ISBN 3-927613-26-6. 21cm. Lingva kaj literatura eseo el 1983, kun apendico de tri eseoj jam broŝure aperintaj. 63,00 gld.

Kiel mi travivis la Duan Mondmiliton. Ana Klag (1926). Vieno: Klag, 1995. 32p. ISBN 3-901211-09-8. 21cm. Personaj rememoroj. 7,50 gld. Senpaga aldono: la germana versio.

Kompleta inventaro de la pasivaj participoj -ata kaj -ita kunligitaj kun formo de la verbo "esti" en la verko "La rabistoj" (1968). Raymond Schwartz (1894-1973). Saarbrücken: Iltis, 1995. 10p. ISBN 3-927613-37-1. 30 cm. Represo de tajposkripto siatempe dissendita anekse al Akademio cirkulero. 6,00 gld.

Latina kiel interlingvo, La. Latein als internationale Sprache. Věra Barandovská-Frank (1952). Dobřichovice: KAVA-PECH, 1995. 191p. ISBN 80-85853-12-4. 21cm. Monografio pri la estinteco, nuno kaj pluo de la latina lingvo. Kun detala germanlingva resumo post ĉiu ĉapitro. 23,10 gld.


Maŝino kiu kriis, La. Div. aŭtoroj. Vieno: Pro Esperanto, 1995. 105p. ISBN 3-85182-033-9. 23cm. Dek unu rakontoj de Piron, Nervi, Boulton, Steele k.a. pri "strangaj fenomenoj". 22,50 gld.

Mia indiana knabeco. Luther Standing Bear. El la angla trad. William Harmon. Berkeley: Bero, 1995. 79p. ISBN 1-882251-09-1. 21cm. Indiana ĉefo Staranta Urso rakontas sian infanaĝon. 12,60 gld.

Ne kiel Meier! Invito al revizio de niaj konceptoj pri la konjugacio en Esperanto (1963). Raymond Schwartz (1894-1973). Saarbrücken: Iltis, 1995. 47p. ISBN 3-927613-36-3. 21cm. Represo de fama kontribuo al la "ata/-ita batalo". 9,30 gld.

Stato kaj estonteco de la internacia lingvo Esperanto, La. Red. Petr Chrdle. Dobřichovice: KAVA-PECH, 1995. 191p. ISBN 80-85853-08-6. 21cm. Prelegkolekto de la samtitola kolokvo de la Akademio de Esperanto (julio 1994). 26,40 gld.

Verda radio, La (1882). Jules Verne (1828-1905). El la franca trad. Jeannine Vincent. Paris: UFE, 1995. 64p. 21cm. Dua parto. En la tipa sfero de angla banloko la alloga Elisabeth kaj ŝiaj du strangulaj onkloj senlace serĉas la originon de mistera verda lumradio. 10,80 gld.



Post la forpaso de Karolo Piĉ montriĝos la vera amplekso de lia verkaro.

DIVERSAĴOJ

Kasedoj:

Edgar + Asorti. 1995. Tra 12 diversastilaj kantoj sonas la violono de la 12-jara Edgaras Piŝĉikas, stelulo de la Tampere UK. 42 min. 15,00 gld.

Famaj kantoj por belaj horoj. Kantas Kateřina Kudlíková, Miroslav Smyčka. Trad. Joachim Giessner. Dobřichovice: KAVA-PECH, 1995. Kun tekstoj. 18 kantoj el operoj kaj operetoj. 64 min. 17,10 gld.

Finnaj eĥoj. Steleto 75-jara. Kantas Kaje-ensemble, Aino kaj Raimo Tanskanen. Steleto, 1995. Kun tekstfolio. 4 finnaj popol-kantoj kaj 13 aliaj, kantataj de blindula koruso. 19,80 gld.

Jadwiga kantas. Kantas Jadwiga Dzięgielewska. Krakovo, 1995. Dek kanzonoj polaj, rusa, franca kaj Esperanta. Plane akompanas Grażyna Nazarko. 22,50 gld.

Rusa muzika salono. Vespero I. Malnova romano. 1995. 12 rusaj romanoj prezentitaj de la ofta UK-gasto Galina Staneŝnikova kaj ŝia filino Polina. 16,50 gld.

Samarkand'. Ĵomart kaj Nataŝa. Akompanas Andrej Berce (klavaro). Stokholmo: la aŭtoroj, 1994. Kun tekstoj. 11 kantoj, plejparte de Ĵomart. 25,20 gld.

Poŝtkarto:

Tero. Bazelo/Zuriko: Ernst, 1995. Salutkarto el la planedo Tero, kun ties bazaj donitaĵoj. 0,60 gld.

• Orientiĝu en Germanio

Pluraj regionaj informiloj en Orienta Germanio ne estas sen intereso eĉ por eksterlandanoj. Valoras unu respond-kuponon ekz. la dumonata, distra kaj informata *Magdeburga Folio* (Klaus Dieter Dungert, Olvenstedter Grund 25, DE-39130 Magdeburg) aŭ la kvaron-jara *Voĉo el Turingujo* (Karl-Heinz Sommer, Pf. 458, DE-99009 Erfurt). Kvaronjare aperas ankaŭ *Saksa Kuriero* (Michael Behr, Koburger Str. 83, DE-04416 Markkleeberg) kaj *PANORAMO-Info* (Hans-Joachim Gunkel, Querfurterstr. 20, DE-06132 Halle/Saale).

• Bakin: Verkaro E-rilata

XU Shanshu (1922-1994), eksa ĉef-redaktoro de *El Popola Ĉinio*, kolektis en 402-paĝa, plejparte ĉinlingva volumo ĉiujn E-rilatajn verkojn kaj tradukojn de Bakin (1904-), Honora Patrono de UEA. "Bakin kaj Esperanto" (Ĉina E-Eldonejo, 1995, kun antaŭparolo de CHEN Yuan) konsistas el 11 artikoloj de Bakin pri Esperanto, 7 dramoj kaj noveloj kiujn li ĉinigis el Esperanto, kaj 35 leteroj liaj al esperantistoj. (ĈIN Kajĝi)

• Gratulon, kolegoj!

Multaj leteroj salutis en la n-ro 95/3 de *Tutmondaj Scienco kaj Tekniko* (eldonas E-Asocio, Academia Sinica, 52 Sanlihe, CN-100004 Beijing, Ĉinio) la oktobran dekjariĝon de la revuo, festitan per memorkunveno la 15-an de okt. Ekde la n-ro 95/1 la koloraj reklam-paĝoj igas *TSTE* unu el la plej montrindaj E-periodaĵoj.

Dekjara fariĝis ĉi-jare ankaŭ *Informilo*, monata gazeto de E-handikapuloj. *Bulteno* de aŭstria fervojistoj festis 40-jariĝon. La 90-jara *Ruslanda Esperantisto* aĝas du monatojn pli ol la revuo *Esperanto*: ĝi aperis unuafoje en aprilo 1905. *Ruslanda E-isto* (ĉi-monata kaj akurata, abonebla ĉe UEA por 20 gld.) estas samtempe juna kaj veterana — nome, ĝi ankoraŭ ne vivis entute dekon da jaroj, pro aper-ĉeso de 1910 ... ĝis 1991!

Reagoj



Lingvistika Auschwitz-mensogo

I. Ertl raportis (apr., p. 70) pri misfamiga artikolo en suplemento al *Neue Zürcher Zeitung*, en kiu okazis malica atako kontraŭ Esperanto. Li citis ankaŭ el mia letero de leganto, kiun la Zurika revuo aperigis en kripligita formo. En ĝi mi parolas pri “lingvistika Auschwitz-mensogo”, ĉar efektive la aŭtoro de la atako, Wolf Schneider, intence ridindigis, bagateligis kaj provis senkreditigi la Internacian Lingvon kaj ties parolantaron.

Al tia defendo de la esencaj vivorajtoj de nia lingvo kaj de ties parolkomunumo reagis iu eks-GDR-ano Ulrich Becker (jul.-aŭg., p. 136), misasertante ke mi “ĵonglus kun la morto de milionoj da homoj en la naziaj koncentrejoj”, kaj li nomis la atakon de Schneider “‘bagatela’ afero”.

Kian mensan misformiĝon atingis nia Movado, se la atakojn kontraŭ la lingvo kaj la lingvanoj ĝi nomas “‘bagatela’ afero”? Ĉu oni jam forgesis ke inter la murditoj de la nazioj troviĝis ankaŭ esperantistoj, kaj ke nia afero suferis la plej akrajn persekutojn? Kiu nomas tion bagatela afero, tiu perdis sin mem kaj nian aferon.

Reinhard Haupenthal (Germanio)

Aplaŭdinda decido

Dum miaj tri densaj semajnoj en Finnlando, preparitaj de la finnaj samideanoj kaj de UEA, ĉio iris glate kaj ĝojigis la gastojn. Dankon! Mi scias kiom da pensoj, penoj, zorgoj estis malantaŭ la laŭdinda rezulto. Pro tio mi forte aplaŭdas la decidon de UEA transpreni la riskon de ebla defcito, kiun riskon ĝis nun havis la gastigantaj asocioj. Mi proponas krome ke UEA ankaŭ subtenu ilin finance jam dum la preparo de la venontaj kongresoj.

Astrid Hanke (Germanio)

Aŭtoraj rajtoj

Mi legis en *Esperanto* (jul.-aŭg., p. 137) ke Nikola Stranganski tradukis al la bulgara kaj eldonis *Retoriko* de prof. d-ro Ivo Lapenna. Tio okazis sen mia permeso. Kompreneble, estas bone ke oni disvastigas la gravegajn verkojn de mia edzo. Tamen, oni memoru ke mi posedas ĉiujn aŭtorajn rajtojn de post lia forpaso.

Birthe Lapenna (Grøndalsvej 30, DK-2000 Frederiksberg, Danio)

Tro kosta tablopeco

Tutkoran dankon al la finnaj organizantoj de la neforgesebla kongreso!

Sendube la ege konvena kaj moderna kongresejo ludis gravan rolon en la sukceso. Kaj sendube ĝi estis sufiĉe kosta. Tamen mi demandas al UEA: ĉu vere estis necese kaj juste ke Litova E-Asocio, varbonte kelkajn abonantojn por sia revuo *Litova Stelo*, devis pagi 640 gld. por peco de tablo en koridoro, antaŭ la vestodeponejo, je grandeco de 60 x 160 cm-oj? Ja ne temas pri iu komerca (okcidenta) entrepreno, sed pri eldonejo el t.n. eks-socialisma lando, kiu baraktas pri sia pluekzistado. Laŭ mia opinio nepre necesas fari diferencojn kaj fiksi decajn prezojn aŭ pli bone rezigni pri tiaj kotizoj.

Nora Caragea (Germanio)

Respondas la Konstanta Kongresa Sekretario: Standojn en UK kutime mendas E-instancoj kun komerca celo aŭ kiuj volas propagandi siajn ideojn al e-istoj. La prezoj estas publikigataj en la Dua Bulteno. Por movadaj instancoj ili fakte atingas nur ĉirkaŭ duonon de la sumo kiun UEA pagas pro la budoj al la kongresejo. Litova E-Asocio mendas sian standon laŭ ĉi tiuj kutimaj kaj konataj kondiĉoj, kaj planas fari tion ankaŭ venontjare.

Kiu kulpas pri nerespondo?

Reage al artikolo de D. Cibulevskij (marto, p. 52), C. Borremans skribas (jul.-aŭg., p. 136) ke “post la falo de la Berlina Muro ne plu venis respondoj... de gesamideanoj el la ‘oriento’”, menciante ĝuste Ukrainion. Mi devas kontesti: krom ke “por iuj Esperanto ne plu gravas”, tre serioza kialo estas ankaŭ nefunkcio de nia poŝta sistemo. Ekz. dum la lastaj tri jaroj mi — por kiu E-kontaktoj tre gravas, ĉar mi strebas mondkomunikigi la anojn de

mia junulara klubo — sendis pli ol 150 leterojn al eksterlando, kaj ricevis apenaŭ dudekon da respondoj.

Mi ne kredas ke ĝentilaj esperantistoj povas tute ne reagi al letero, des malpli delegitoj, al kiuj mi skribis kun membromarkoj de UEA. Do, la sola klarigo estas ke la poŝtaj instancoj de mia lando — same kiel en la “gloraj” tempoj de KGB en Sovetunio — speciale malebligas korespondadon kun eksterlando.

Eksterlandaj geamikoj, se vi ne ricevas niajn respondojn, tre verŝajne ne nur viaj korespondantoj kulpas pri tio.

Tatjana V. Auderskaja

(Korolenko 5-b, kv.26

UA-270100 Odesa, Ukrainio)

Bonvenon al Uzbekio!

Certe pravas mia amiko Cibulevskij: pro la nuna ekonomia situacio en la landoj de la tiom stulte disfalinta Sovetio por iuj estas malfacile akcepti gastojn. Sed oni povas klare difini la kondiĉojn de gastigado, ja eĉ en bonstataj landoj la gastigantoj foje avertas ke la gastoj devas iom pagi.

Al mi mem povas veni 1-2 (ge)gastoj samtempe, kaj ili pagos nur pro sia vojaĝbileto!

Eugeno S. Perevertajlo

(Ab.kesto 140, Poŝtamt

UZ-700000 Taŝkent, Uzbekio)

Tamen filmo pri Langlet

“Kial oni neniam faris filmon pri Valdemar Langlet?” — vi demandis en majo (“Vi trovos”). Mi fakte vidis filmon pri lia agado en Budapeŝto per la sveda televido, iam inter 1984-87. Oni interparolis kun pluraj personoj savitaj de Langlet.

Mi havis la plezuron renkonti lin ĉe la 50-jara jubileo de Sveda E-Federacio en Stokholmo, pentekoste de 1956, kiun li ĉeestis kun nia dua pioniro Paul Nylén. Ambaŭ estis tre modestaj kaj simpatiaj. Mi havis la ĝojon akompani s-ron Langlet al la subtera trajno, ĉar pro la mallumo li vidis ne sufiĉe bone por sola trovi la vojon.

Gulli Svensson (Svedio)

Bojkoto radik(al)a

Proteste kontraŭ la decido de Jacques Chirac pri reokazigo de atombombaj eksplodoj en Mururoa, mi publike anoncas ke de nun mi ne plu uzos franc-devenajn radikojn en Esperanto.

Uto Piulo (Pacifiko)



Jornal de Paraiba do Sul (Rua Saturnino Braga, 104-Paraiba do Sul, RJ 15850-000, Brazilo) aperigas duonmonate E-kolumnon kun sekcioj naci-lingva kaj Esperanta. La ĵurnalo bonvenigas originalajn E-lingvajn poemojn. (*Brazila Esperantisto*)

• Armenio: Bulteno vivsignas

“Post longedaŭra silento la armena e-istaro denove anoncas pri sia ekzisto”, per la unua numero (junio 1995) de la modesta bulteno *Armenio* de la landa E-Asocio (str. Abovjan 3, AM-375010 Erevan), kiu dankas ĉiujn subtenintojn kaj invitas al Erevano, kie esperantistoj kunvenas ĉiuvendrede en Domo de Amikeco.

• Ĉinio: Helpu inunditojn

La urbo Fushun (provinco Liaoning) estis frapita de katastrofa inundo la 29-an de julio. Lokaj e-istoj helpas la suferintojn per mono, vestoj ktp. Informojn donas delegito Wu Guojiang (Fushun Shiyouyichang Yanjiusuo, CN-113008 Fushun, Liaoning; faks. +86/413/233-22-07), ĉe kiu bonvenas donacoj (UEA-konto “wugu-r”).

• Italio:

Konkurso “Romeo kaj Julieta”

Kadre de la Unua Internacia E-ista Festivalo “Romeo kaj Julieta” (Verono, 21-27 junio), internacia juĝkomisiono (sekretario: Aldo de’ Giorgi) aljuĝos premiojn al originalaj E-lingvaj poemoj. Sendu antaŭ la 31-a de decembro maks. 3 poemojn, en 6 ekzempleroj (el kiuj nur unu surhavi la nomon kaj adreson de la konkurso) al: Gruppo Esperantista Veronese, C.P. 1616, IT-37100 Verona.

• Kroatio: Projekto Petrinja

Loĝantoj de la kroatia urbo Petrinja kiuj devis rifuĝi de tie en 1991, inter ili esperantistoj, nun revenas al sia hejmloko. La Esperanto-societo Bude Borjan (Amruševa 5, HR-10000 Zagreb) volas helpi ilin kaj invitas kontribuojn al la projekto Petrinja.

• Kubo: Invitas aktiva asocio

Unumonata vizito de la irana Yumeiho-terapiisto Gholamreza Azarhoushang en marto plu kreskigis la intereson pri ĉi tiu orienta masaĝo, konata en Kubo ekde la Havano UK (1990). Jam cento da Yumeiholernantoj pagas kotizon al Kuba E-Asocio (KEA).

KEA kontribuis per kvar prelegoj al la scienca programo de la lingvofoiro Expolingua ’95 en Havano (18-23 apr.), kie ĝi muntis standon inter 250 ekspoziciantoj.

Dum Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (19-20 majo) 27 aŭtoroj prezentis en scienca muzeo de Havano 31 prelegojn, precipe pri temoj rilataj al lingvoj, lingvoinstruado kaj sano.

Malgraŭ kelktaga tropika ŝtormo, anoj el diversaj landpartoj ĉeestis la 4-an Nacian Seminarion por E-instruistoj en la sidejo de KEA (22-24 junio).

KEA (Pf. 5120, CU-10500 La Habana) atendas ankaŭ eksterlandanojn por sia dua nacia kongreso (7-9 marto 1996, Havano): ili povos ĝui antaŭkongreson turisman kaj Esperantan.

La 350 membroj de E-rondo en Santiago de Cuba (p/a Pedro A. Peña Martínez, Corona 163, San Mateo y San Antonio, CU-90100 Santiago de Cuba), el kiuj 200 gejunuloj, petas helpon: plej bezonataj estas lernolibroj, revuoj, papero, globkrajonoj ks. (*Avanco, Boletín, Jajabo, Noktuo*, G. Azarhoushang, J. R. Rodríguez Gómez)



Aŭstrio: En trilanda angulo

De pli ol 15 jaroj tradicie kunvenas miloj da homoj ĉe la kuniĝ-punkto de la landlimoj aŭstra, itala kaj slovena, Dreiländerecke (“Trilanda angulo”) por Festo de Amikeco. E-istoj neniam malatentas la feston: ĉi-jare ili 52-oje rendevuis la 10-an de septembro por kuntosti ĉe la montpinta monumento kaj por sentrude informi pri Esperanto. La partoprenintaj E-grupoj pliiĝis la informan efikon per posta raporta letero al siaj regiona kaj urba instancoj, substrekante la pac-konstruan rolon de Esperanto. (E. Doerfler)

• Brazilo: Valoraj vizitoj

Lastatempe la bieno-lernejon Bona Espero (vd. jun., p. 101) vizitis la prezidanto de Teozofia Societo en Brazilo, la ĝenerala sekretario de Rotariaj kluboj en la ĉefurbo Braziljo, la komerca ataŝeo de la pola ambasado, la germana kultur-ataŝeo (kun kelkaj muzikistoj turneantaj tra Brazilo) kaj estro de granda eldonejo en Paragvajo. El tiuj kontaktoj rezultis diversaj utiloj: E-kurso ĉe rotarianoj, Zamenhof-festo ĉe la pola ambasadejo ktp.

• Hungario: Ligi lernantojn

Ronda Tablo de ĉ. 20 E-organizoj en Hungario konsentis ke, por “restigi viva kaj disvastigi la E-movadon”, nepras “ligi la lingvolernantojn al la E-komunumo kaj movado”. Tial ili okazigos nur tiajn E-kursojn kie oni instruos ankaŭ pri la bazoj de la E-kulturo, la movada strukturo kaj la enmovadaj servoj. Krome ili celas ke ĉiuj iliaj membroj, same kiel ĉiuj novaj kursanoj, abonu iun internacian E-gazeton. (*Eventoj*)

• Litovio: Interbaltlingvo

Dum la 31-aj Baltiaj E-Tagoj (8-16 julio, Girionys, Litovio) 202 e-istoj diskutis pri la lingvaj problemoj en Baltaj landoj rilate al la eŭropa integriĝo. En rezolucio ili proponis uzi Esperanton en la komunikado inter la popoloj de Baltio, kunordigi la agadon de la E-Asocioj de Estonio, Latvio kaj Litovio per regulaj renkontiĝoj, kaj ellabori komunan alvokon de la tri E-asocioj al ŝtataj instancoj de siaj landoj pri enkonduko de Esperanto en diversgradajn lernejojn.

• Niĝerio: Federacio fondita

Dum tritaga kunsido de kunordigantoj (9-11 jun., Owerri), fondiĝis Niĝeria E-Federacio. Ĝi celas i.a. "disvastigi la uzadon de E-o en Niĝerio por plifaciligi intertriban komunikadon". Ĝis oni elektos estraron, funkcias 10-membra provizora komitato elektita, kiun gvidas Evaristus Attah.

• Norvegio: Strategio ĝis 2000

Laŭ strategia plano (1995-2000) de Norvega E-ista Ligo, akceptita en ties kongreso (Budor, 16-18 junio, 25 partoprenantoj), la landa E-movado celu ke en 2000 la plimulto de la norvegoj sciu ke Esperanto estas lingvo; ke ĝi estu rigardata kiel realisma alternativo en la lingvodebato; kaj ke 500 membroj de NEL (kiu nun havas 370 membrojn) regu Esperanton. Por tio oni prioritigas tri laborkampojn: surmerkatingadon, instruadon, kaj stimulon de jamaj membroj, kaj starigas sekciojn pri tiuj temoj. Elektiĝis nova estraro: prezidanto iĝis Torstein Kvakland, 40-jara ĵurnalisto. (K.H. Ulles-tad, *Norvega Esperantisto*)

• Togolando: Tria Kongreso

Unuiĝo Togolanda por E-o, ĵus aliĝinta al UEA (B.P. 12096, Lomé), aranĝos en la regiono de Kpalime la Trian Togolandan E-Kongreson de la 28-a ĝis la 31-a de decembro.



• Ekumenismo: Venu ĝejnuloj

Ĉirkaŭ 90 protestantoj kaj katolikoj kunvenis en la universitato de Kaunas por la 11-a Ekumena Kongreso (31 jul.-7. aŭg.). Pastro Bernhard Eichkorn proponis ke al la sekva kongreso (27 jul.-3 aŭg. 1996, Szombathely, Hungario) oni instigu veni junajn aktivulojn porpacajn kaj medio-protektajn, kiuj helpu doni idean kontribuon esperantistan al la Dua Eŭropa Ekumena Kunveno (1997). Pluaj informoj: Jacques Tuinder, Henegouwenlaan 35, 1966 RH Heemskerk, Nederlando.

• Informado: Varbo "Vendredo"

Per mono kolektita tiucele, la E-klubo de Numazu (Japanio) aperigis reklamon pri E-o en la nekonformisma semajngazeto *Syūkan kin'yōbi*, ("Vendredo") kaj planas re-anonci baldaŭ. Jam unu freŝa membro de Japana Esperanto-Instituto diris ke li aliĝis pro tiu reklamo. (Yamasaki S.) En Brazilo simile pozitive efikis al la nombro de novaj kursanoj en Rio-de-Ĵaneiro reklampanelo kiun la loka asocio havas en metrostacio. (*La Lampiro*)

La ĉi-jara eldono de la germanlingva "Fischer-almanako de internaciaj organizoj" abunde kaj akurate (kvan-kam ne ĝisdate) informas pri UEA, dank' al iamaj kontaktoj de kunaŭtoro Jan Ulrich Clauss kun la E-aktivuloj Renato Corsetti kaj Uwe Joachim Moritz. (U.J. Moritz)

Laŭ peto de la ĉefredaktoro, kiun li kontaktis por atentigi pri la lingva problemaro, Germain Pirlot aperigis longan artikolon, "Esperanto: tuŝebla

utopio", en la franca revuo *Les Nouvelles de la Francophonie*.

Courrier du Personnel, semajngazeto por la personaro de eŭropaj institucioj en Bruselo, plurfoje revenis al Esperanto sur sia opini-paĝo.

World Citizen News, bulteno de movado por tutmonda civitaneco, oftete pritraktas E-on; septembre aperis tutpaĝa artikolo de M. Fettes.

• Interlingvistiko: Kursfinintoj en Torino

Post la interlingvistika kursaro de prof. Fabrizio Pennacchietti, 73 studentoj de la Universitato de Torino trapasis la finan ekzamenon ĉe la katedro pri interlingvistiko kaj e-ologio, starigita en 1994. Kvardek studentoj akiris krome baznivelan diplomon de Itala E-Instituto. (*L'Esperanto*)

En la socilingvistika sekcio de la 26-a konferenco de la germana Societo pri Aplikata Lingvistiko (28-30 sept., Kassel) interlingvistikaj prelegoj de Alicja Sakaguchi kaj Detlev Blanke trovis bonan akcepton ĉe kelkaj gravaj lingvistoj kaj vekis diskuton i.a. pri la lingvistika valoro de E-o. (D. Blanke)

• Literaturo: Forumo pri amo

Kelkdek e-istoj el 11 landoj venis al Gdansk (Pollando) por la 14-a Internacia Literatura Forumo (15-19 jul.) de Kooperativo de Literatura Foiro. La temon "Amo en poezio kaj prozo" enkondukis Miguel Fernández, kaj kontribuis al ĝi i.a. Perla Martinelli pri la ĵus lanĉita *Dekameron* (tradukita de Waringhien kaj Martinelli), Ljubomir Trifonĉovski pri bulgara ampoezio, kaj Fernández pri García Lorca. István Nemere kondukis tra amverkoj de la Esperanta prozo kaj gvidis rondan tablon "Kien la E-liriko?". Kadre de la forumo okazis ĝenerala asembleo de Esperanta PEN-Centro, kiu i.a. decidis peti aliĝon de la Centro al LF-koop kiel kolektiva membro. (L. Trifonĉovski)

• Muziko: Instigaj infankantoj

La eldonota 36-paĝa kantlibro *Vivu la vivo* enhavas didaktikajn kantojn kiuj instigas infanojn gesti, ridi, aktori ktp. Sendu antaŭ la jarfino tiajn kantojn, kun muziknotoj, al la kunordiganto Ton Verwoerd (Luxemburglaan 545, 1966 MJ Heemskerk, Nederlando), ĉe kiu vi ankaŭ povas antaŭmendi la kantararon (15 gld. al lia UEA-konto "tonv-i").

Uzo kaj misuzo de la Delegita Reto

Lastatempe delegitoj de UEA ricevis multajn leterojn kiuj petas monhelpon, ekz. por pagi la kostojn de komplika operacio. Aliflanke, kelkaj delegitoj plendis pri ricevo de komercaj ofertoj, eĉ anglalingvaj.

Ni konsilas ne sendi monon al petantoj, sed unue informi ĉe la CO de UEA, kiu povas enketi pri la efektiva bezono kaj pri la plej taŭga maniero kontentigi ĝin.

Rilate komercajn ofertojn, ni memorigu ke delegitoj neniel havas devon respondi al tiaj sendaĵoj, precipe ne al ne-esperantlingvaj.

Centra Oficejo



• Instruado: Islanda gastado

Ekde 1974 dekoj da gejunuloj lernis Esperanton de Baldur Ragnarsson (dekstre) en la gimnazio Hamrahlid (Rejkjaviko). La gimnazio ĉi-jare akceptis gastlernantojn el ses landoj (Francio, Finnlando, Germanio, Islando, Italio kaj Nederlando) dum tri monatoj, kiuj entuziasme partoprenis E-lecionojn de Ragnarsson, sesfoje semajne. (H. Sæmundsson)

• Naturamikoj: Centjariĝo

Dum la jarkunveno de TANEF, la Esperanta fako de la 100-jariĝanta Turista Asocio Naturamikoj (9 majo, Vieno) Manfred Pils, la ĝenerala sekretario de Naturamika Internacio (NAI), promesis esplori kiel NAI pli efike subtenu la laboron de TANEF. La itala Naturamika Asocio decidis enkonduki Esperanton kiel sian oficialan lingvon flanke de la itala. Proveksempleroj de *La Migranto*, revuo de TANEF, haveblas ĉe Erna Döring (Pf. 225, CH-4003 Basel, Svislando). (*La Migranto*, VERDire)

• Radio: Vieno ne mutiĝis

La protestleteroj de esperantistoj reagintaj al la alvoko (jul.-aŭg., p. 128) ne estis vanaj: Radio Aŭstria Internacia denove elsendas en Esperanto ekster Eŭropon, kaj ĝi eĉ ricevis trian elsendhoron por Eŭropo! (Vd. la frekvencojn sur p. 186.) Vi povas sendi laŭdan leteron, en nacia lingvo, al Prof. Paul Lendvai, Intendant ORF International, AT-1136 Wien, Aŭstrio. Sud-amerikaj e-istoj, kiujn Vieno ne atingas, povas esprimi deziron ricevi la voĉon de Aŭstrio. (Amikaro de Esperanto en Radio)

Post kelkmonata nefunkciado pro forŝtelo de ĝia tuta materialo, Radio FMR (prononcu: "efemer") denove dissendas sian ĉiusemajnan, unuhoran

E-programon en Tuluzo. Dum la trudita paŭzo ĝiaj redakcianoj Floréal Martorell, Rikardo Cash k.a. atingis malfermon de du novaj E-programoj ĉe la Tuluzaj radio-stacioj Canal Sud kaj Occitanie, kiuj havas malsamajn publikojn. Por sia rubriko pri la E-gazetaro (Esperanto-Magazino, BP 2435, FR-31085 Toulouse), FMR bezonus regule ricevi pli da periodaĵoj. (*Internacia Ĵurnalisto*)

Subteno per informoj du novajn E-programojn nacilingvajn: Fréquence 4, La Ponto, BP 36, FR-33015 Bordeaux Cedex, Francio; kaj Punt 6 Radio, c/ Major, 15, ES-43201 Reus, Katalunio. (*Kataluna E-isto*)

• Terminologio: Wŭster kompleta

La kvar aperintaj volumoj de *Enciklopedia vortaro Esperanto-germana* (A-Korno, 1923-1929, 576 p., haveblaj ĉe la libroservo de UEA) de Eugen Wŭster (1898-1977) estas trezoro de la Esperanta leksikografio. La parto "Korno-Z" restis manuskripta. Nun la Aŭstra Nacia Biblioteko surfiligis la kompletan manuskripton, de "Korno" ĝis "Z", kaj la parton "Korno-L" en prilaboro de Hans J. Plehn. La mikrofiĉo, por kiu Detlev Blanke verkis ampleksan enkondukon, estas mendebla je 800 aŭstraj ŝilingoj (Internacia E-Muzeo Wien, Batthyanystrasse, Hofburg, AT-1010 Wien, Aŭstrio).

PATRONOJ DE TEJO 1996

Francio: Marc Savre. Germanio: Gisela Macioszek. Japanio: Hitosi Iwamoto.

SOCIETO ZAMENHOF 1996

Britio: Jim Lawson. Francio: Jean Amoureux; André C. J. Gaillard. Germanio: Harry Bily; Elisabeth Hirsch; Gisela Macioszek; Jean Prager; Richard Hirsch. Nederlando: Maud Meijwes.

DONACOJ 1995 (gld.)

ĝis la 30-a de septembro

Fondaĵo Afriko: Spezoj dum la 80-a UK 367,00. Italio: D. Trombetta 2400,00. Sumo ĉi-jara 9711,07.

Fondaĵo Ameriko: Dum la 80-a UK: Aŭkcio 2073,91; Budo 190,48; E. Ellenberg 30,40. Britio: P. Danning 36,70. Usono: D. Holland 30,40. Sumo ĉi-jara 3374,42.

Fondaĵo Canuto: Estonio: L. Jõumees 20,00. Germanio: W. Heinrich 223,50. Israelo: S. Mizeruĥa 330,00. Sumo ĉi-jara 9728,92.

Fondaĵo Grabowski (en usonaj dolaroj): Francio: T. Nowak 100,00. Hispanio: A. Goralski 350,00; K. Krause 100,00; L. Serrano Pérez 50,00. Italio: E. Doerfler 100,00. Nederlando: G. v.d. Horst 100,00; M. v.d. Horst 100,00. Sumo ĉi-jara 673,60.

Ĝenerala Kaso: Diversaj malgrandaj 5,08. Sumo ĉi-jara 3909,18.

Konto Espero: Britio: P. Danning 36,70. W. McCallum 62,75. Sumo ĉi-jara 1647,71.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Usono: R.F. Grossman 40,00. Diversaj malgrandaj 11,11. Sumo ĉi-jara 1056,87.

Volontula Fondaĵo: Germanio: W. Heinrich 223,50. Japanio: J. Brozovsky 500,00. Norvegio: E. Matland 25,00. Sumo ĉi-jara 1922,26.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Unu el la plej interesaj! Abonu NUN al

EVENTOJ


Petu senpagan provnumeron:
pk 87, HU-1675 Budapest, Hungario.

Joseph DELPINO (1913-1995), iama fakdelegito pri geografio kaj lingvoj en Novjorko, mortis la 12-an de julio en Londono, dum esperantista gastado.

Vilma Sindona EICHHOLZ (1926-1995) mortis en julio en Bailieboro (Ontario, Kanado). Ŝi verkis kompleksan rektmetodan kurson por infanoj, *En novan mondon* (1984), kaj anglalingvan broŝuron pri justa dulingveco en Kanado (1982), kompilis kun sia edzo Rüdiger Eichholz la ampleksan artikolaron *Esperanto in the Modern World / Esperanto en la moderna mondo* (1982), kaj kreis instruajn kartludojn. Ŝi estis dumviva membro kaj delegito pri ĝardenkulturo.

Juliette FAYOT (1899-1995), dumviva membro, pentristino, kiu verkis kaj ilustris *Guidlibro tra Paris* (1965), forpasis la 4-an de aŭgusto ĉi-jare en Parizo.

Henrik KARLSSON (1912-1995) forpasis komence de julio en Kisa (Svedio), kie li estis delegito ekde 1947. Li membris en Societo Zamenhof dekomence (1975).



Romeo Pagliarani

Romeo PAGLIARANI (1930-1995), membro-fondinto de Akademio Internacia de la Sciencoj, mortis la 22-an de junio en Cesena (Italio), kie li estis delegito dum jardeko. Li fondis la E-grupon de Cesena kaj prezidis la E-istan Union de la regiono Romanjo. Dank' al li Esperanto estis eksperimente instruata dum tuta jardeko en bazlernejo de Cesena.

Gérard SCHNEIDER (1921-1995), franca katolika pastro, mortis la 4-an de junio. En sia paroĥo Saint-Clément li plurfoje instruis E-on, kaj aranĝis per Esperanto multjaran rilatadon kun paroĥo en Germanio.

Douglas B. Gregor

Nia Honora Membro D. B. Gregor havis elstarajn atingojn en lingvistiko. Dank' al informoj ĉerpitaj el la revuo *Language International*, ni povas nun kompletigi ĉi-rilatan nekrologon (jun., p. 120).

Ankoraŭ kiel aktiva instruisto gimnazia, Gregor publikigis multajn artikolojn klasik-filologiajn. Post retiriĝo en 1969, li dediĉis sin tute al lingvistikaj studoj. Li verkis pionirajn monografiojn pri la nord-italiaj lingvoj romanjola (1972) kaj friula (1975), kaj pri la romanĉa lingvo de Svisio (1982). Li estis la unua kiu tradukis la romanjolan poezian majstroverkon *Pulon Matt* el la 15-a jarcento en la italan (!) kaj la anglan (1976).

Estas necerte ĉu iu krom li regis ĉiujn ses keltajn lingvojn (la kimran, irlandan, skotgaelan, kornvalan, manksan kaj bretonan), pri kiuj li publikigis la unuan detalan komparon (*Celtic — A comparative study*, 1980). En la libro li pasie pledis por la konservado de la parolataj keltaj lingvoj, same kiel por la revivigo de la kornvala kaj la manksa. (H. Tonkin)

“Ĉiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene egalrajte al ĉiuj ĝiaj loĝantoj.” (L.L. Zamenhof). Interesatoj pri homaranismo turnu sin al Info-Servo, Bismarckstr. 28, DE-35037 Marburg, Germanio.


Korespondi deziras tutmonde:

Anoj de junulara E-klubo Verdaĵo (14-21 j.). Intereso: literaturo (precipe sciencfiksio), verkado, nuntempa muziko, orientaj artoj kaj batalartoj, kantado, ŝakoj, lingvoj, intelektaj ludoj ktp. Skribu al: Dom uĉonih, str. Mendeleejeva 4, UA-270026 Odessa, Ukrainio.

Bicikle vojaĝi ĉirkaŭ la mondo? Skribu al s-ro Gediminas Vasiliauskas, Vals-tieĉiu, 1-3, LT-5818 Klaipėda, Litovio.

Vizitu Maastricht Esperanto-Domo: tranoktado 35 gld pp; fakso/tel +31-43-213.247; retpoŝto Adriaanse@GVO.RuLimburg.nl.

Anoncetoj



Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon ĉe la interna kourilpaĝo.

Esperantistoj en la tutmonda Universitato de la Tria Aĝo, ĉu instruantoj ĉu aktivaj lernantoj. Ni jam konas kvindekajn en 12 landoj sed mankas ĉefe Azio, norda Eŭropo, Afriko. Donu kaj ricevu informojn per nia *Ligilo* ĉe 17 The Grange, Shepherdswell, DOVER CT15 7QB, Britio.

Serioza filatelisto deziras aĉeti kolektojn da pm el GDR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rusio (Sovetunio) kaj Esperantajn filatelaĵojn. Bv. sendi ofertojn al: Tomas Jansson, Seminariegatan 3 A, SE-752 28 Uppsala, Svedio.

Kvardeko da blindaj infanoj en Taĝikio lernas E-on kaj deziras kontaktiĝi kun samhandikapuloj (Natalija Kasy-mova, Majakovskogo 93/1-57, TJ-734060 Duŝanbe).

Tranokteja kaj kurseja entrepreno Källkullen, Carola Antskog kaj Anna Ritamäki, nun havas faksilon je +358/25-423-246. Nova telefonnumero de Anna estas +358/21-2361682.

Jen unika ŝanco

Ricevu senpage 3 sinsekvajn numerojn de la gazeto *Brazila Heroldo*, kiu laŭ la juna numero de la revuo *Esperanto* "nepre meritas ankaŭ internacian atenton". Nur poste vi pensos pri abono.

Brazila Heroldo

Aperas monate

E-movado	Politiko	Sporto	Informadiko	Diversaĵoj
Kulturo	Ekonomio	Scienco	Turismo	

Suplementoj

Facila – Trimonata gazeto por komencantoj

Panoramo de Interlingvistiko kaj Esperantologio – Java kajero

SENDU VIAN NOMON KAJ ADRESON AL

ZAMENHOF EDITORES

CAIXA POSTAL 1887

01059-970 SAN-PAULO-SP

BRAZILIO

"Esperanto kaj la rilatoj Nordo-Sudo en Ameriko"

AMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO

12 – 17 februaro 1996

en la Universitato de Kostariko en San José.

Prelegoj, Cseh-seminario A, ekzamenoj de UEA/ILEI, kunsidoj, ekspozicio, ekskursoj.

Pliaj informoj: Antonio Leoni de León,
Apartado 7603-1000, San José, Kostariko.

☎ +506-231 41 67; ✉ jleoni@cariari.ucr.ac.cr

Edward Symoens:

BIBLIOGRAFIO DE DISERTACIOJ PRI ESPERANTO KAJ INTERLINGVISTIKO



Tiu ĉi grava informfonto (1989; 159p.) estas nun ĝisdatigita per 63-paĝa suplemento. Kune ili priskribas preskaŭ 250 universitatajn studojn.

Baza libro 21,00 gld.; suplemento 7,20 gld. Oferto: Ambaŭ kune 23,50 gld.

Sanigas nekuraceblajn malsanojn, bonigas farton, donas energion, natura kaj facile lernebla

YUMEIHO - TERAPIO

Orienta Speciala Diina Masaĝo

Koksoston Ĝustiga Premkneda Terapio
de profesia terapiisto Masayuki Saionji.

Dua eldono, reviziita kaj grandigita, riĉe ilustrita.

Prezo 21,00 gld. (rabato 33% por min. 3 ekz.).

Mendebla ĉe la Libroservo de UEA.

Videobendon en diversaj sistemoj (en Esperanto kaj aliaj lingvoj) mendu por 80 gld. ĉe:

Internacia Instituto de Preventa Medicina Praktiko,
CPO Box 405, Tokyo, 100-91, Japanujo.

Vizitu vian propran domon ĉe Nieuwe Binnenweg 176 en Roterdamo dum

MALFERMA TAGO

sabaton la 18-an de novembro 1995

La Centra Oficejo
40 jarojn
en Roterdamo

- ★ Konatiĝu kun la domo kaj ĝiaj laborantoj
- ★ La tutan tagon ĉeestos **William Auld**, kiu antaŭ 40 jaroj pakis la Centran Oficejon en Heronsgate por transporto al Roterdamo. Kaptu la okazon pliriĉigi per lia aŭtografo!

- ★ Senhanta prezentado de Esperanto-filmoj
- ★ Aĉetante en la libroservo, vi ricevos rabaton de 10% (kaj ŝparos la sendokoston)
- ★ Ankaŭ surprizaj ofertoj
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj



Roterdamo imponas per moderna arkitekturo kaj abunda kultura vivo. Pasigu plenan semajnfinojn en la ĉefurbo de Esperantujo! Hotelo Van Walsum estos je via dispono por tranoktado (vd. Jarlibron 1995, p. 242).

